


# junAmiko

33a jaro, n-ro 2/06 (116)

SEPTEMBRO 2006

INTERNACIA ESPERANTO-REVUO DE ILEI POR LERNEJANOJ KAJ KOMENCANTOJ



**NEPALA**

**FESTIVALO**

**"HOLI"**

(Vidu p. 9.)

Perfektigu vian lingvo-scion  
per melodiaj E-kantoj!



Ĉi-foje Jomo ne nur kantas, sed ankaŭ ludas plurajn instrumentojn: gitarojn, pianon, balalajkon, violonon kaj perkutinstrumentojn. La ina voĉo estas Irina Lebedeva Zirka. Jen KD kun 24 kantoj: polaj, ukrainaj, rusaj, ciganaj, jidaj kaj ĉuvaŝaj. Por mendigi turnu vin al VINILKOSMO, FR-31450 Donneville, Francio aŭ rete al: [www.vinilkosmo.com](http://www.vinilkosmo.com).



- Ĉiuj kantoj de la famoŝama produktisto kaj de la posedanto de la registaro verko rezerva!
1. La Golemo 2:35  
 2. La koloro de la amo 3:16  
 3. Liberecaĵoj de fidlando 3:23  
 4. Tumbalalajka 2:12  
 5. La fumo 2:38  
 6. Da nu da naj 1:35  
 7. Cigana preĝo 4:29  
 8. Laŭ la klač' 2:30  
 9. Vagadis mi 3:07  
 10. Suneto 3:43  
 11. La reveno de Taras Bulba 2:47  
 12. Horilko 2:43  
 13. Verda saliko 2:42  
 14. Maruŝa 1:53  
 15. La ĉuvaŝa arto 2:49  
 16. Kampeto kampo 3:32  
 17. Apudmoskvaj vesperoj 2:48  
 18. En dancejo 2:22  
 19. Pola 3:25  
 20. Plifrua Pollando 3:36  
 21. Vistula suito 4:08  
 22. Jen plua foj' 2:21  
 23. Dancu 2:14  
 24. La slavinoj 3:00
- FABRIKITA EN ESPERANTO  
 VKKD 82-026 © VINILKOSMO
- vinilkosmo  
 SACEM  
 CD DIGITAL AUDIO

# AMIKECO

*Amikeco estas la plej bela donaco, kiun homo povas proponi al alia homo, esperantisto al alia esperantisto.*

*Amikeco multobligante ĝojon kaj mildigas nian feliĉon kaj mildigas*

*kaj dividante ĉagrenojn, pligrandigas ĉiujn suferojn.*

*Amikeco estas la plej delikata al niaj interhomaj kontaktoj.*



*kata floro, disvolviĝanta danke. Se ni ne zorgos pri ĝi, ĝi persiste*

*kaj senlace, la floro inte ĉiujn siajn bur-*



*velkos, ne malfermiĝojn.*

*Anstataŭi amikecon nek ĉarmo, nek famo.*

*scipovas nek mono,*

*Amikeco de unu prudenta homo estas pli valora ol amikeco de ĉiuj malsaĝuloj.*

*Amikeco rompas ĉiujn barierojn, kiuj disigas homojn, kaj kontribuas al pli bona interkompreniĝo.*

*Mi esperas, ke nia bela floro de amikeco, disvolviĝinta sur la firma grundo de la lingvo internacia, velkos neniam.*

***Fartu bone, vivu sane, kun Esperanto akompane!***

*Via sincera:*

*JUNA AMIKO*

*bariero: baraĵo, malhelpaĵo / burĝono: el ĝi ekestas floro / persisti: ne cedi, daŭrigi la agadon.*

**Ĉu vi jam sendis vian fabelon al la**

## **Tutmonda Esperanto-Fabelkonkurso ?**

**Ekagu rapide, ĉar la lim-dato estas la 15a de septembro.**

**Vian verkon sendu al:**

***Päätaalo-Instituto, Fabelkonkurso, PL 39, FI-93401 Taivalkoski, Finnlando***

**Pluaj detaloj troviĝas en nia aprila n-ro (115) sur paĝoj 7-8.**

# ENHAVO

Nepala festivalo „Holi” .....	1	Interkultura mondo ( <i>E.Nadikova</i> )	
Jomo slavumas (Vinilkosmo) .....	2	Pri la projekto AKEL .....	26
Amikeco .....	3	Spac-vortenigmo ( <i>smg</i> ) .....	30
Enhavo, kolofono .....	4	Konkurso Abio de l' Espero .....	32
Leporeto ( <i>J. de J.C.Pacheco</i> ) .....	5	Solvoj de n-ro 1/06 .....	33
Nova „Jernu!” ( <i>Neringa</i> ) .....	6	Besto-parado ( <i>Stefan MacGill</i> ) ....	34
Anekdotoj ( <i>Jaan Ojalo</i> ) .....	8	Kondoro ( <i>J.de Campos Pacheco</i> )	36
Humuro ( <i>Elizabeta Rajtmár</i> ) .....	10	Frandaj esprimoj kun „koro” .....	37
Konjo ( <i>Lusi Rimon</i> ) .....	11	Ilustrita frazeologio .....	38
Je la fino de la mondo ( <i>D.Berndt</i> )	12	Testo pri lingvoscio ( <i>G.Kurucz</i> ) ...	39
Helpanta mano ( <i>M.Belošević</i> ).....	14	El nia historio-2 ( <i>Á.Rátkai</i> ).....	40
Himno al Eŭropo .....	15	Kuirado ( <i>J.Felszeghy</i> ) .....	42
Elektronikaj rubaĵoj ( <i>Jakvo</i> ) .....	16	Nguyen Du ( <i>Nguyen T.N. Lan</i> ) ...	44
Hinda legendo, Interesaĵo .....	17	Florkronoj de Havajo .....	47
LUME. Ideo pri festego		Aŭtuna kanto ( <i>A.Karkiainen</i> ) .....	47
( <i>Monika Molnár</i> ) .....	18	Mi scias antaŭe! ( <i>P.Benneman</i> )...	48
Best-enigmato ( <i>Stefan MacGill</i> )...	21	Lingva doktoro ( <i>G.Kurucz</i> ) .....	49
Emil-Erni ( <i>Stefan MacGill</i> ) .....	22	Verda paĝo ( <i>G.Kurucz</i> ) .....	50
La dek-mura ĉambro		Klaŭdia ( <i>Sonmy Alvarez</i> ) .....	51
( <i>Hajni MacGill</i> ) .....	25	Skoltinoj ĉe arbarrando ( <i>Saliko</i> ) ..	52

Sen pied-notoj JUNA AMIKO uzas la plej oftajn 1500 vort-radikojn, kiujn vi trovas en nia hejma-paĝo: [www.junaamiko.inf.hu](http://www.junaamiko.inf.hu) aŭ en [www.eo.lernu.net](http://www.eo.lernu.net).

**Eldonanto** de JUNA AMIKO: ILEI, Riouwstr.172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.  
**Redaktoroj:** *Stefan MacGill* (Pannónia u.30.I.6, HU-1136 Budapest, Hungario, [stefan.macgill@gmail.com](mailto:stefan.macgill@gmail.com)) kaj *Géza Kurucz* (Hitel u.10.fsz.16, HU-6000 Kecskemét, Hungario, [geza@banyai-kkt.sulinet.hu](mailto:geza@banyai-kkt.sulinet.hu))  
**Lingva revizianto:** *Baldur Ragnarsson* (Islando).  
**Kunlaborantoj:** *s-ino Saliko, Anja Karkiainen, Vesa Pölkki* (Finnlando), *Elena Nadikova* (Rusio), *Neringa Zasaite* (Litovio), *Marie-Helene Desert* (Francio), *Jadranka Mirić* (Serbio), *s-ino Saranath* (Hindio), *Bardhyl Selimi* (Albanio), *Dieter Berndt* (Germanio), *Evandro de Freitas* (Brazilo), *Elizabeta Rajtmár, Zoltán Kurucz, Monika Molnár, Judit Felszeghy, Hajnal kaj Karina MacGill* (Hungario), *Marija Belošević* (Kroatio), *Michel Nkwirikiye* (Tanzanio), *Eugenia-Ecaterina Popoviciu* (Rumanio), *José J.Campos Pacheco* (Kubo), *Jasuo Hori* (Japanio), *Gian Piero Savio* (Israelo), *Nguyen Thi Ngoc Lan* (Vjetnamio).  
**Grafikistoj:** *Pavel Rak* (Ĉeĥio), *Monika Molnár* (Hungario).  
**Komputila kolora tekniko:** *János Bakk* (Hungario). Presita en **Presejo Saluton** (Gárdi Jenő u.14, HU-1047 Budapest, Hungario).  
**Administranto:** *Stefan MacGill* (adreso supre) kaj *Anna Besenyei* (Hungario), retadreso: [esperanna@gmail.com](mailto:esperanna@gmail.com)

ISSN 0230 1318

La sekva numero aperos en decembro.

## Kio okazis al la saltema leporeto?

Fru-matene, la amiketoj de la saltema leporeto frapis ĉe ĝia por-do.

„Bonan matenon, Saltemulo! Venu, ludu kun ni!”

„Aj, aj, aj! Mi ne povas. Mi tute ne dormis. Treege doloras min dento! Aj! Aj! Aj!”

Ĉiuj bestetoj de la kamparo rigardis sin reciproke, ĉar neniam antaŭe ili vidis leporeton kun dento-doloro. Kaj kiam Saltemulo malfermis la pordon, ĝi havis tian inflamon, ke liaj amiketoj decidis tuj konduki lin al best-kuracisto. En la bestkuracista ĉambro, kun granda penado, la leporeto malfermis sian buŝon plorante.


„Nekredeble! Estas la unua fojo en mia vivo, ke mi trovas karion ĉe leporeto! Ĉu estas eble, ke karoto estigas karion?” ekkriis la bestkuracisto.

„Aj! Sinjoro kuracisto”, klarigis la leporeto, „antaŭ kelkaj semajnoj, mi trovis saketon da dolĉaĵoj, kaj mi sola manĝis ilin.”

„Ĉu vi ne brosis al vi la dentojn? Ĉu vi ne scias, ke dolĉaĵoj estigas karion? Mi kuracos vin, kaj kiam malaperos la doloro, kaj la inflamo, mi devos ŝtopi tiun trueton, kiun la bakterioj faris.”

„Jes, sinjoro kuracisto. Mi lernis la lecionon. Se vi manĝas dolĉaĵon, vi devas brosi la dentojn. Ho, kaj krome, ne estu tiel egoisma!”

*bakterio*: estaĵo nevidebla per okuloj; ĝi multobligas per disdubiĝo / *egoismo*: mem-amo / *inflamo*: malbona sanstato kun alta temperaturo kaj doloro / *kario*: putra difektiĝo de ostoj, plej ofte de dento / *karoto*: legomo, kiu havas longan ruĝetan radikon / *reciproka*: tia, ke unu el ambaŭ aŭ pluraĵoj agas tiel same, kiel la alia(j).



Tradukis: Jozefo de Jesús Campos Pacheco, Kubo

# Kelkaj novaĵoj pri *lernu!*



<http://eo.lernu.net>

**RAPIDA,  
MODERNA,  
ĈIO-SCIA!**

**Ne forgesu viziti ĝin!**

En la numero 1/05 (112) mi skribis pri *lernu!* (<http://www.lernu.net>) – senpaga mult-lingva paĝaro por lerni Esperanton. Tiuj, kiuj jam vizitis la paĝaron kaj legis la antaŭan artikolon pri ĝi, ekvidos, kiel la paĝaro ŝanĝiĝis ekde tiam. Por tiuj, kiuj ne legis la artikolon kaj/aŭ ne konas la paĝaron, estos ŝanco per tiu ĉi artikolo ekscii pri ĝi ion novan kaj interesan.

Mi ne ripetos la tutan historion (ĉar mi jam skribis pri ĝi antaŭe), mi nur ripetos, ke la ideo pri *lernu!* naskiĝis en aprilo 2000 dum unu el Esperanto-seminarioj, kiu okazis en Svedio kaj kiun aranĝis la organizo **Esperanto@Interreto**. Ĝis nun la projekton subtenas la usona esplor-fondaĵo „Esperantic Studies Foundation“ (pli detalajn informojn pri ĉi tiu fondaĵo vi povas trovi sur la paĝoj de *lernu!*). Krom la kerna teamo la paĝaron helpas prizorgi kaj administri kelkdek lingvo-helpantoj kaj tradukantoj. Nur dank' al komuna laboro la paĝaro povas ekzisti.

Do, kio ŝanĝiĝis ĉe *lernu!* lastatempe? Unua kaj verŝajne la plej grava novaĵo estas tute nova aspekto kaj strukturo de *lernu!*. La paĝaro iĝis tiom granda, ke aperis bezono aranĝi ĝin, por ke ĝi iĝu pli oportuna, pli logika kaj pli facile uzebla por la uzantoj. Post longaj diskutoj kaj multmonata laboro la teamo finfine sukcesis realigi siajn dezirojn. La nova paĝaro jam estas preta kaj nun estas multe testata. Se vi volas vidi, kiel *lernu!* ŝanĝiĝis post ĉiuj ŝanĝoj, vizitu la adreson: <http://eo.lernu.net>.

Multe kreskis ne nur la enhavo de la paĝaro, sed ankaŭ la nombro de la uzantoj. Kiam mi verkis la unuan artikolon, ĉe *lernu!* entute estis 12.000 registritaj uzantoj kaj nun ili estas jam preskaŭ 25.000. La nombro de niaj uzantoj duobliĝis.

Krom novaj aspekto kaj strukturo ekzistas ankaŭ aliaj novaj aferoj ĉe *lernu!* Ekzemple, serĉebleco tra la paĝoj. Se vi volas trovi paĝojn, sur kiuj

aperas iuj bezonataj por vi informoj, vi devas en specialan fenestreton enskribi iujn ŝlosil-vortojn, kiuj rilatas al tiuj informoj, kaj la programo trovos la necesajn paĝojn.

Ĉe *lernu!* estas multaj vortaroj, pere de kiuj la uzantoj povas facile legi ĉiujn tekstojn en Esperanto, kiuj troviĝas ĉe la paĝaro. Sufiĉas alklaki ajnan Esperanto-vorton, kaj tuj apude aperos ties traduko en alia lingvo. Simila sistemo ekzistis ankaŭ ĉe la malnova paĝaro, sed nun ĝi iĝis multe pli bon-kvalita kaj oportuna por uzado.

Kiel ni ĉiuj scias, estas grave praktike uzi la lingvon. Pro tio ĉe la nova *lernu!* troviĝas multaj interesaj iloj por tio. Kelkaj el ili estis plibonigitaj. Ekzemple, la forumo de *lernu!* nun iĝis multe pli facile uzebla kaj la teamo esperas, ke la uzantoj ŝatos kaj aktive uzos ĝin por komunikado. La interna mesaĝo-sistemo de *lernu!* ankaŭ iĝis pli oportuna, ekzemple, aperis ebleco arkivigi iujn gravajn mesaĝojn.

La paĝaro renoviĝas ne nur teknike, sed ankaŭ per novaj tekstoj kaj proponataj servoj. Ekzemple, aperis nova pli detala priskribo de la gramatiko de Esperanto kun multaj ekzemploj kaj klarigoj. Ĝi estas verkita en Esperanto kaj pro tio ĝin povas uzi nur tiuj uzantoj, kiuj jam iom scias Esperanton kaj volas profundigi siajn sciojn. Ankaŭ eblas trovi kelkajn novajn kursojn, kiuj estas tre interesaj. Krome ĉiam aldoniĝas novaj artikoloj de „Juna Amiko“, kiujn la uzantoj kun plezuro legas. La paĝaro ankaŭ ofertas novan servon – „Vorton de tago“. Ĉiutage oni ret-poŝte ricevas iun Esperanto-vorton kun klarigoj kaj ekzemploj de ties uzado. Tiun ĉi servon la uzantoj ege ŝatas. Novaj filmetoj, ĉiutage nova anekdoto en Esperanto sur la ĉefpaĝo, interesaj konkursoj – eĉ ne eblas listigi ĉiujn novaĵojn. Eblas nur diri, ke ĉiam aperas io nova. Sed la teamo ĉiam atendas viajn komentojn, proponojn, ideojn kaj kritikojn. Ni ĉiuj kune faru la paĝaron interesa kaj utila!

*Neringa ZASAITE, Litovio*

*administri*: prizorgi aferojn de organizaĵo / *arkivo*: kolekto de malnovaj materialoj / *fondi*: krei kaj funkciigi / *forumo*: kunveno, en kiu oni pridiskutas publikajn aferojn / *kerno*: interna grava parto de io / *klaki*: igi sekan brueton per, ekzemple, muso de komputilo / *komenti*: eldiri sian opinion aŭ argumentojn pri iu okazaĵo, eldiraĵo / *moderna*: nun-tempa / *projekto*: ideo, proponita kiel efektivigota / *seminario*: kunveno por diskuti pri io / *teamo*: kolektivo de kunlaborantoj aŭ kunludantoj / *testi*: mult-flanke kontroli.

## Neatendita respondo

Voltaire, estante ankoraŭ knabo, estis foje demandita de ekleziulo:

“Diru, mia knabo, kion ni devas fari, por ke Dio nin pardonu?”

La juna Voltaire iomete pensis kaj respondis:

“Ni devas peki, sinjoro pastro.”

## Efika rimedo

La angla poeto *Swift* (1667-1745) foje rajdis kun sia servisto tra la kamparo kaj restis dum la nokto en gastejo. La sekvintan matenon Swift postulis siajn botojn. La servisto alportis ilin, sed ili ne estis purigitaj.

“Kial vi ne purigis la botojn?” demandis Swift.

La servisto respondis:

“Ho, mi pensis, ke ne estas necese; ĉar ili ja baldaŭ ree malpurigōs.”

Swift diris nenion, surmetis la botojn kaj kaŝe ordonis al la gastejestro, ke li ne donu al la servisto maten-manĝon.

Kiam, poste, li volis ekvojaĝi, la servisto diris:

“Via moŝto, mi ankoraŭ ne ricevis ion por manĝi.”

“Ho,” diris Swift, “mi opiniis, ke ne estas necese; ĉar vi ja baldaŭ ree mal-satiĝos.”

De post tiu tago la servisto ĉiam purigis la botojn.



## DISTRITA VERKISTO

Iu distrita verkisto veturis en vagonaro. Venis kontrolisto de la biletoj. La verkisto serĉis en siaj poŝoj, sed ne trovis la bileton. La kontrolisto konis la faman verkiston kaj diris, ke li venos poste por kontroli lian bileton.

La distrita verkisto ne trovis sian bileton ankaŭ en la sekvanta stacio. La kontrolisto trankviligis lin kaj diris:

„Ne zorgu, mi kredas, ke vi havis bileton.”

„Sed mi devas trovi la bileton,”

diris la verkisto, „por scii, kien mi veturas.”



*El la lernolibro de Jaan Ojalo, Estonio*



# LA TRADICIOJ

Razen Manandhar *de popoloj*

## NEPALA FESTIVALO „HOLI“

Nia gaja festivalo „Holi“, kiu okazas dum la plen-luna tago de februaro aŭ marto laŭ la luna kalendaro, havas mitan originon. Laŭ hinda mito vivis iam diablino **Holika**. Kun sia diabla frato, **Hiranyakasyapu** (kiu kredis, ke ne ekzistas dio krom li), Holika komplotis mortigi **Pralhad**, la filon de la frato, ĉar tiu ne kredis la aserton de sia patro.

**Pralhad** ĉiam diris, ke **Vishnu** estas la dio kaj tio multe ĉagrenis la gefratojn. Ili mult-foje provis mortigi la knabon, sed li ĉiu-foje estis savita de la dio. Finfine, Holika decidis mortigi la knabon, kurante kun li en fajron. Ŝi opiniis, ke fajro ŝin ne atakos, ĉar ŝi estas protektata de alia dio, **Brahma**, sekve fajro ne detruos ŝin. Sed **Brahma** ne helpis, kiam ŝi volis mortigi la knabon, sekve ŝi mortis pro la fajro. La morto de Holika ĝojigis multajn homojn, kiuj celebris la feston per koloroj.

Nun mi deziras prezenti al vi la nun-tempan celebradon de la festo de koloroj. Malgraŭ tio, ke ĝi havas – kiel vi mem ĉi-supre legis – religian originon, oni celebras ĝin ne nur pro religio. Alia kialo estas, ke koloroj plaĉas al homoj, precipe junuloj partoprenas en tiu ĉi festivalo, ĉar ĝi donas al ili fi-ŝancon ataki knabinojn per akvo kaj koloraĵoj. Tiu-tempe, dum unu plena semajno virinoj kaj knabinoj ne kuraĝas eliri el siaj hejmoj, ĉar fi-junuloj, ŝminkinte sian vizaĝon per diversaj farboj, atakas ilin sur la strato, kaj pro la tradicio ili ne povas eĉ protesti. Multaj el ili devas reiri al sia hejmo, ĉar sur la strato iliaj vestaĵoj fariĝis malpuraj aŭ malsekaj pro akvo kaj koloraĵoj. La registaro deklaris, ke oni ne rajtas ataki iun, kiu ne volas ludi aŭ ĝui la festivalon tia-maniere, sed malgraŭ ĉio, tio ofte okazas.

Cetere, la festivalo mem estas sendube tre gaja.

*celebri*: plenumi ceremonion okaze de grava evento / *detru*: neniigi / *diablo*: mal-ĉiel-landano / *festivalo*: amasa kunveno kun festa karaktero / *komploti*: sekrete kunagi kontraŭ iu / *origino*: deveno.

“Kioma estas hodiaŭ?”

“Mi ne scias.”

“Sed la gazeto estas en via mano. Rigardu la daton.”

“Vane mi rigardas. Ĝi estas la hieraŭa.”

“Kion fari, sinjoro doktoro? Mia edzo senĉese parolas en sonĝo.”

“Eble permesu al li paroli tage.”

# humuro

de **Elizabeta Rajtmár,**  
Hungario

“Sinjoro instruisto, permesu al mi hejmen-iri”, petegas Ludoviko en lerno-horo de matematiko. “Mi havas grandegan doloron.”

“Kie, mia kara?”

“Ĉi tie, en la lernejo.”

“Kie troviĝas la forkego, fileto mia?”

“Apud la ŝovelilo, paĉjo.”

“Kaj kie troviĝas la ŝovelilo?”

“Apud la forkego.”

“Ho, stultulo!

Kie troviĝas la forkego kaj la ŝovelilo?”

“Ili troviĝas unu apud la alia.”



“Kial vi vizitas la drink-ejon tiel ofte?”

“Ĉar mi ŝatas la muzikon.”

“Kial do vi ne vizitas koncertojn?”

“Ĉar tie oni ne vendas bieron.”

“Fileto mia, kial vi ne ludas kun Petro?”

“Ho, panjo, ĉu vi volonte ludus kun infano, kiu malbon-kondukas, estas mensogema, ŝtelas kaj estas malpura?”

“Ne.”

“Nek Petro.”

“Kio fariĝi, paĉjo, ĉu okulisto aŭ dentisto?”

“Fariĝu dentisto. Oni havas nur du okulojn, sed tridek du dentojn.”

*koncerto*: publika muzika programo / *stulta*: malsaĝa, malinteligenta / *ŝoveli*: transmeti sablon, ŝtonetojn per speciala ilo (vidu la bildon).

# Konjo

*En nia korto loĝis hundeto – flav-bruna. Nigre makulita, vila hararo ŝirmis ĝiajn okulojn.*

*La knaboj nomis ĝin Konjo pro tio, ke en juna aĝo la hundido penis kapti urbajn kolombojn, saltis post ili en aeron kaj ridinde falis sur dorson. Konjo estis amata de ĉiuj. La infanoj portadis por ĝi manĝon, la maljuna sinjorino verŝadis lakton en ladan bovlon. La hundo reciprokis la zorgon per korinklino, renkontis ĉiujn per ĝoja bojo kaj gaje ŝvingis per vosteto, kiam oni man-karesis ĝin.*

*Subite Konjo malaperis. La geknaboj ne vidis ĝin matene ekirante al lernejoj, nek vespere, kiam ili kunvenis en la korto.*

*Ĉiuj serĉis Konjon kune, en ĉiuj truoj kaj fendoj - ĝi mankis entute. La infanoj revenis hejmen malĝojaj. Ĝi ne aperis ankaŭ en la sekva mateno. Dum postaj tagoj ili daŭrigis voki la hundeton, metis en ĝian bovlon bongustajn regalajojn - vane, Konjo ne revenis. La korto sen ĝi ŝajnis malpleneca.*

*Komenciĝis ferioj, iĝis varme, la geknaboj ofte iradis al la rivero. Foje du amikoj, transirante la fervojan deklivon, ekaŭdis en arbustoj malfortan jelpeton. Ili zorge disigis la dornajn trunkojn kaj ekvidis tie diketajn brunajn hundidojn. Ili sidis en la kavo sub falinta arbo kaj mallaŭte pepis. La knaboj kaŝ-atendis, ĝis baldaŭ aperis la hundino - ĝi estis Konjo! -, kiu venis, lekis la idojn kaj komencis ilin nutri. Dum la sekvaj tagoj la infanoj alportadis manĝojn kaj lasis ilin apud la nesto.*

*Kaj post semajno Konjo revenis en la korton. Ĝi fiere kuris antaŭe kaj ĝin sekvis tri hundidoj - same rufaj kaj vilaj.*



*Ĉiuj infanoj tre ĝojis pro ili, por la hundetoj oni eĉ konstruis novan, pli vastan budon. Nun en la korto staras kvar bovloj da lakto - unu granda kaj tri malgrandaj.*

Lusi Rimon, Israelo

*arbusto: arbeto / bovlo: larĝa duon-globa taso / domo: pikilo de kreskaĵo / jelpi: aĝre ekkrii / lado: metal-folio / pepi: eligi birdo-similan voĉon / rufa: flave bruna / ŝvingi: rapide kaj ripetite moveti tien reen / vilo: densa kruda hararo.*

# Je la fino de la mondo

„Li estas bela, forta viro, 179 centimetrojn alta. Bonega pafisto. Laŭ informo de iu indiĝeno nun li troviĝas en iu el la eskimaj vilaĝoj en la regiono de Norda Rivero, kiun ili nomas 'Fino de la mondo'. Li ĝuas grandan respekton. Kial? Mi ne scias. Por vi gravas, ke li mortigis! Nun li vivas tie sub la nomo Denny Key. Alkonduku al mi tiun homon, serĝento!”

Jen estas ĉio, kion Albert Last – serĝento de la Kanada Rajdista Polico – eksciis de sia estro.

„Alta, pafisto, ie ĉe la Beringa Markolo”, sufiĉas, ĉu ne? Murmuris Last, metante siajn bezonaĵojn sur la sledon. Li kontrolis la nutraĵ-provizojn, ankoraŭ-foje trastudis la mapon en la oficejo, kaj matene li ekiris al la neĝ-plena ebenaĵo.

300 mejloj! Tra neĝo kaj frosto en la polusa regiono!


La unuaj tri tagoj estis bonaj, 'nur' dudek gradoj sub nulo, jen malpeza nebulo, jen bela vetero. Dum la kvara tago la vetero ŝanĝiĝis. Forta norda vento levis neĝ-amasojn. La hundoj sinkis en ili, kaj la vojo fariĝis ĉiam pli kaj pli malfacila. Jen nova fortoĉerpa tago. Tag-mezo. Last esperas, ke jam morgaŭ li atingos la eskimajn vilaĝojn 'Je la fino de la mondo'. Li preparas modestan tagmanĝon: iom da

faboj, lardo kaj grandan poton da kafo. Al la hundoj li donis iom da sekigitaj fiŝoj.

Sed jen okazis io, kio ŝanĝis la tutan vivon de Albert Last.

Li alpaŝis al la kuirujo, ekgenuis por verŝi kafon en la tason. En tiu momento eksaltis unu el la hundoj kaj ekmordetis lian ŝultron. La tuta bolanta enhavo de la pota verŝiĝis sur la kruojn de Last. La pantalonoj algluiĝis al la brul-vunditaj kruoj. Ĉiu moveto kaŭzis egan doloron. Lia situacio estis malespera: sola, meze de neĝa ebenaĵo, malproksime de helpo kaj civilizacio. Sola, kun vunditaj kruoj, kapabla fari nenian moveton.

La nokton li pasigis maldormante kun egaj doloroj. Matene li trenis sin al la sledo, aljungis la hundojn kaj en duon-konscio li falis sur la sledon. La hundoj, kvazaŭ ili sentus la senpovecon de sia estro, ofte haltis kaj ĉiunmomente komencis batalon inter si.



Je la deka horo Albert Last venis al la fino de siaj fortoj. Li svenis.

Kiam li rekonsciĝis, li ne sciis, kio okazis al li. Li levis la kapon kaj vidis, ke li kuŝas sur dika urso-pelto meze de vasta tendo. Liaj kruroj estis ĉirkaŭvolvigitaj per kelkaj dikaj bandaĝoj.

Apud li staris viro, blankulo.

„Bon-venon, serĝento” li klinis sin al Last. „Mi bonvenigas vin ‘Je la fino de la mondo’. Mi supozas, ke vi serĉas min. Mi estas Denny Key.”



Last provis sidiĝi. „Vi divenis, Key,” kaj kun ĝemo li refalis sur la ursopelton. „En la nomo de la leĝo mi arestas vin!”

„Restu trankvila, serĝento. Unue viaj kruroj,” la viro trankvile devolvis la bandaĝon. „Iam mi studis medicinon, sed tio estis jam antaŭ longa tempo. Mi pensas, ke vi ĉi tie devos pasigi la vintron.” Key surmetis sur la muskolojn sanigan unĝventon. „Mi ne volas profiti el via senforteco. Mi atendas, ĝis kiam vi povos plenumi vian devon.”

La tagoj pasis. Komenciĝis tempo de fulmo-tondroy kaj neĝ-blovadoj.

La san-stato de la serĝento malrapide, sed tamen pliboniĝis. Ĉiu-tage li miris, de kia malproksima distanco alvenas eskimoj kun diversaj malsanoj, por ke Key sanigu ilin. Li havis eksterordinarajn kuracajn sukcesojn – jes, tial li estis tiom ŝatata!

Pasis ses longaj monatoj.

La vundoj de la serĝento resaniĝis, sen peno li partoprenis eĉ du-tagan ĉasadon.

Venis vespero kun varma blovo de suda vento.

Ie malproksime bojis hundoj, viroj sidis ĉe simpla tablo kaj odoro de supo miksiĝis kun tiu de tabaka fumo.

La serĝento prenis sian valizon kaj rigardis el la tendo eksteren. „Denny, mi konstatis, ke vi estas bona homo. Estas vero, vi mortigis. Vi mort-pafis mon-avidan komerciston, kiu estis pli malrapida ol vi. En Okcidento oni trenadus vin duon-jaron al juĝejoj kaj fine ili konstatus: sindefendo. La Nordo postulas agon. Vi pafis. Morgaŭ mi foriros – kaj vi restos ĉi tie!”

Denny Key ruĝiĝis kaj embarasite forviŝis de sur la tablo restaĵon de tabako.

„Estas sufiĉe granda puno resti ĉi tie ‘Je la fino de la mondo’. La Nordo bezonas vin. Ĉi tie vi estas pli utila ol en ĉelo de malliberejo.”

Matene de la venonta tago Albert Last forveturis kaj post dek tagoj li prezentis al sia estro jenan deĵoran raporton:

„... *mi mortus, se ne estus la tiea kuracanto, kiu min trovis, transportis al sekura loko kaj dum la tuta vintro min flegis kaj nutris. Pri Denny Key mi eksciis de indiĝenoj, ke li forlasis*

*la vilaĝon. Ĉar mi ne sukcesis plenumi la ricevitajn ordonojn, mi petas, maldungu min el la Kanada Rajdisto Polico.”*

Tradukis: Dieter BERNDT, Germanio

*aresti*: malliberigi / *bandaĝo*: vundo-ŝirma tolaĵo / *boji*: hunde bleki / *civilizacio*: kultura nivelo / *defori*: plenumi labor-servon / *eskimo*: popolo en la regiono de norda poluso / *fabo*: semo-frukto de legomo / *jungi*: alligi besto(j)n al ĉaro, sledo / *lardo*: surdorsa grasajo de porko fumajta aŭ salita / *medicino*: kurac-arto / *meĵlo*: mezur-unuo de longo / *muskolo*: subhaŭta membro-movilo / *poluso*: plej norda aŭ suda parto de la ter-globo / *provizi*: rezervi por posta uzo / *serĝento*: mez-rangulo / *sinki*: enprofundiĝi / *sledo*: glit-veturilo / *sveni*: perdi konscion / *treni*: tiri pezaĵon / *ungvento*: kuraca densa haŭt-ŝmirajo / *urso*: granda blanka mambesto de polusa regiono.



## HELPANTA MANO



Mi ne povas ne menciigi la nomon de **s-ino Edvige Ackermann-Tantin**. Estante prezidanto de la Triesta Esperanto-Asocio (TEA) ŝi ĉiu-tage frontas amason da taskoj en unu el la plej malnovaj E-asocioj de Esperantujo (TEA ĉi-jare festas sian 100-jariĝon). Malgraŭ tio ŝi ege konscias pri la graveco aktivigi lernantojn, t.e. la plej junan generacion.

Pro tio antaŭ kelkaj jaroj ŝi faris kuraĝan elpaŝon: okaze de Semajno de Internacia Amikeco (lasta plena semajno de februaro) anstataŭ inviti profesiajn E-aktorojn, ŝi elektis amatoran E-dram-grupon kaj donis al ĝi eblecon prezentiĝi. Kaj la rezulto: la publiko tre entuziasme aplaudis kaj kuraĝigis ilin. Sed s-ino Edvige ne nur "surscenigis" eksterlande la lernantojn el najbara lando, sed ankaŭ trovis manieron subteni ilian alvenon: vojaĝon kaj tranoktadon, ĉar sen tio ...

Pasint-jare, okaze de Kristnasko

denove ŝi, subtenata de la membroj de TEA, invitis lernantojn partopreni internacian konkurson "Mia kripo". La rezulto estis ege impona: pli ol cent verkoj el deko da landoj estis prezentitaj al la ĝenerala publiko de Triesto. Denove prezentiĝis ne famaj artistoj, sed infanoj, lernantoj de Esperanto. Dank' al la komprenemo de s-ino Edvige ili havis eblecon vojaĝi eksterlanden, prezentiĝi antaŭ "fremda" publiko kaj krome viziti la muzeon pri kripoj en Triesto.

Ĉi tie mi provis nur mallonge prezenti "etajn servojn", kiujn faras s-ino Edvige kaj per kiuj, eble eĉ ne konscie, ŝi multe kontribuas al la plifortigo de la E-instruado kaj edukado de etuloj, kaj tio pleje gravas, ĉu ne?

*Marija Beloŝević, Kroatio*

*kripo*: manĝujo por bovoj, naskiĝejo de Jesuo.

# Himno al Eŭropo

## Muziko de Beethoven

### Esperanta teksto de Broccatelli



Kan-tu ku-ne a - mi - ka - ro, ni la ĝo - jon fes-tas nur,



nek ri-ve-ro, nek mon-ta-ro plu land-li-moj es-tas nun.



Ho Eŭ-ro-po, hej - mo ni - a, tfo daŭ - ra - dis la di - vid';



nun bri-le-gu be-lo vi - a, ĉi - u es-tas vi - a id'.



Vi - a fla-go kun - fra - ti - gas ho-mojn post mi - li - ta temp',



Vi - a le-ĝo nun ku - ni - gas ci - vi - ta - nojn en kon-sent'.

Sub la ŝildo de la juro  
ni vivados en konkord'  
Tio estas nia ĵuro:  
unu land' kaj unu sort'.

Tra l' Malnova Kontinento  
nun laŭtiĝu nia kant',  
flugu per facila vento  
en la lingvo Esperant'!

Jen ekzemplo por la mondo  
jen direkto, jen la voĵ':  
tut-homara granda rondo  
en la paco, en la ĝoj'!

*Pied-notoj sur paĝo 37.*

## Konsciuj pri la sekvoj de viaj misagoj!

La suba artikolo estas kompilita laŭ ĉef-artikolo de SENNACIULO (aprilo 2006), kiu estas la oficiala organo de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda). Ĝi estas la laborista sekcio de la esperantistaro. (Vizitu la TTTpaĝojn: <http://satesperanto.free.fr>)

### Elektronikaj rubaĵoj

En la jaro 1996 en la landoj de Okcidenta Eŭropo la viv-daŭro de komputilo estis 6 jaroj, antaŭ ol oni anstataŭigis ĝin per nova modelo. En la jaro 2005 komputilo daŭris nur 2 jarojn. En 2004 vendiĝis entute 674 milionoj da portebaj telefonoj, kies kutima vivo-daŭro estas ne pli ol 2 jaroj. Ni kreas per ĝi novan formon de rubaĵo, la elektronikajn rubaĵojn, kiu jam reprezentas 5 % de la rubaĵoj en la mondo!



Laŭ la ciferoj de „Greenpeace”, la elektronika rubaĵo triobliĝos dum la sekvantaj 5 jaroj pro la evoluo de la „malriĉaj landoj”.

Ĉu vi jam faris al vi la demandon kien iros via malnova komputilo, portebla telefono, televidilo, video-aparato, ktp. ? La respondo estas simpla kaj preskaŭ evidenta, en Azion, Ĉinion kaj Hindion, kie 25.000 homoj „prilaboras” pli ol 20.000 tunojn da elektronika rubaĵo. 25 % de la rubo estas komputiloj.

Natur-protekta asocio „Greenpeace” vizitis la plej konatajn lokojn, kie oni reciklas kaj malkonstruas malnovajn elektronikajn aparatojn kaj konstatis, ke ne nur la malkonstruaj terenoj suferas veneniĝon pro pezaj metaloj kaj toksaj polvoj, sed ankaŭ la ĉirkaŭaj riveroj kaj subtera akvo-rezervo. Kontrolo ĉe ĉinaj laboristoj hejme montris, ke ili kunportas la venenajn polvojn en la vestaĵo al la loĝejo kaj per ĝi malsanigas la dom-bestojn kaj plej terure siajn proprajn familianojn. Nekuracebla damaĝo al la nerva sistemo malsanigas homojn, inter ili ankaŭ multajn infanojn, por ĉiam.

Aziaj landoj liber-vole akceptas la rubon, kaj jes, estas bona maniero recikladi anstataŭ detrui, sed reciklado devas okazi en adaptitaj konstruaĵoj aŭ fabrikoj, en kiuj sekureco kaj sano de la laboristoj estu garantiitaj. Bedaŭrinde kapitalismo kalkulas ne laŭ homoj kaj sano, sed laŭ profito.

Laŭ specialistoj la sola solvo por redukti rubon estas produkti pli pure. La produktantoj devas eviti la uzadon de toksaj materialoj. La entreprenoj Nokia, Sony, Ericsson kaj Samsung promesis produkti pli purajn. Ili promesis mem fari la plej grandan parton de la reciklado, por ne plu esti la grandaj malpurigantoj. Ĉu ili vere faros ion por pli sana mondo? Ni sekvos ilian agadon.

Laŭ la artikolo de Jakvo (paĝo 51)



## HINDA LEGENDO

Granda majstro, iun tagon, ordonis al siaj disĉiploj:

– Iru en arbaregon kaj alportu ĉion kion vi trovas tie senutila.

Ĉiu el ili revenis portante ion: herbon, radikon, ŝelon ....

Ununura disĉiplo revenis kun malplenaj manoj. Sed ĝuste ĉi lasta ulo estas laŭdita de la majstro. Li ja komprenis ke ĉio, en la arbarego, estas utila kaj estas malutile forporti.

Tiu disĉiplo, poste, iĝis kortega kuracisto. Lia scio venis de observado de la naturo fare de emeritoj kaj riŝoj.

Vera farmaciaĵo estas farita, preskaŭ senescepte, per herboj kaj plantoj, precipe sovaĝaj. La arbarego estas granda rezervejo por sanigaj rimedoj.

Ni devas respekti kaj respektigi la naturon!

*Tradukis Tullia Spaggiari (Tulja Spaĝĝari) el Correggio, Italujo*

## INTERESAĴO

Usona inventisto produktis en Anglio lumantajn pantoflojn. Per ili li intencis favori al tiuj, kiuj nokte vizitas necesejon aŭ fridujon. La lampoj de la pantofloj aŭtomate ekfunkcias, kiam iu enŝovas la la piedojn en ilin. La lampoj lumigas antaŭ si ĝis 6-8 metroj kaj ili ne tuj ĉesas lumi, kiam oni eligas la piedojn el la pantofloj. Ili atendas ĝis la uzinto enlit- iĝas kaj sin kovras.

La inteligentaj pantofloj kostas 24 pundojn.

*Elizabeta Rajtmár*

*funkcii:* plenumi sian taskon, ĉi tie: lumi / *inteligenta:* saĝa, alte kulturita / *inventi:* e- pensi ion novan, ĝis tiam nekonatan / *pantoflo:* hejma pied-vesto / *pundo:* mono en Britio.






Rubrikestro:  
Mónika Molnár  
Gepatroj, instruistoj,  
bonvolu legi ĉi tiujn  
paĝojn al etuloj kaj  
helpi al ili ĝui ilin!



## Naskiĝas ideo pri festo, eĉ festEĝo(1)...



KontentULO(2) estis tiom kontenta, ke li tuj volis festi la eventon de la „*Granda Nom-elpensado por ULoj*”. Li telefonis al ElegantULO(3):

- Saluton \_\_\_\_\_ (4)! Ĉu ankaŭ vi ĝojas havi belan, konvenan nomon? Mi kontentas! Mi tre tre kontentas! Mi \_\_\_\_\_ (5)!

*tre tre kontentas = kontentEGas*

- Saluton \_\_\_\_\_ (6)! Jes! Estis tre tre bona, eĉ \_\_\_\_\_ (7) ideo peti helpon de \_\_\_\_\_ (8) niaj junaj amikoj!

- Mi pensas, ke \_\_\_\_\_ (8) estus bona ideo danki ilin per granda, \_\_\_\_\_ (8) festo, kiun organizus la Ulo-Bando. Kion vi opinias?

- Jes, brila ideo! \_\_\_\_\_ (8) Por la festo mi surmetos mian ĉapelon por esti tre tre eleganta, por esti \_\_\_\_\_ (9)! Ĉu vi bezonas helpon por la organizado?

- Jes. Dankon pro via propono, ĉiu helpo bonvenas. Jen niaj taskoj:




- ✎ desegni tre tre belajn, do \_\_\_\_\_ (10) invitkartojn,
- ✎ prepari \_\_\_\_\_ (11) dekoraciojn,
- ✎ pripensi \_\_\_\_\_ (12) menuon,
- ✎ inviti niajn \_\_\_\_\_ (13) amikojn.



Estas vere multo por fari. Mi eĉ ne scias, kie komenci. Ĉu vi havas ideon?

- Jes! Ĉu vi memoras, kiom lerte, eĉ \_\_\_\_\_ (14) helpis nin niaj junaj amikoj por trovi niajn nomojn? Ili certe povos helpi nin en pluraj detaloj. Ekzemple, mi certas, ke ili tre bone desegnas.
- Jes, mi jam ofte vidis, ke ili \_\_\_\_\_ (15) desegnas. Mi Pensas, ke ni povas fidi je ili. Mi preparos la paperojn kaj petos ilian helpon.
- Eble ankaŭ por la menuo kaj la dekoracio ili havas unikajn, \_\_\_\_\_ (16) ideojn. Mi demandos ilin.
- En ordo. Post la alveno de la rezultoj mi revokos vin por prepari la sekvajn paŝojn. Ĝis la reaŭdo, \_\_\_\_\_ (17) !  
vian festan ĉapelon!
- Certes! \_\_\_\_\_ (18)! Ĝis!



Karaj junaj amikoj, ĉu vi sekvis nian konversacion? Ĉu vi bone aŭ eĉ boneGE sekvis ĝin? Kion vi diras? Ke tio ne eblis? Ke mankis vortoj? Ĉu vere? Ho, jes! Mi komprenas. Mia telefonaparato estas tre MALjuna. (Cetere ankaŭ mi estas MALjuna, mi havas jam naŭdek-ses jarojn!) Do, mia MALjuna, MALnovEGa telefono ne ĉiam funkcias perfektEGe, kaj pro tio kelkfoje oni aŭdas MALgrandan bruon anstataŭ vortoj. Ĉu vi povas helpi al mi rekonstrui la tekston? Mi havas la vortojn kiuj mankas, sed mi ne vidas bone por remeti ilin al iliaj ĝustaj lokoj. Mi tre kontentos pri via helpo, ja mi estas KontentULO!

Atentu pri la ĝustaj sencoj kaj la finaĵoj! Por doni ekzemplon mi remetis kelkajn vortojn al iliaj ĝustaj lokoj helpe de mia lupeo. Sed mi tre lacas. Bonvolu helpi al mi!


Se vi atentas pri la jenaj reguloj de paroj, vi tute ne havos problemojn:

- ~a ~o (bonega paro) ~aj ~oj (ĝustegaj vortoj)
- ~a(j)n ~o(j)n (perfektegajn respondojn)
- ~e ~i/~is/~as/~os/~us/~u (lertege solvi la taskon)

Jen la vortoj, kiuj atendas vian helpon:

belEGajn / belEGajn / bonEGa / bonEGan / bonEGe / tertEGe  
/ elegantEGa / ElegantULO / ElegantULO / ElegantULO /  
festEGe / grandEGa / interesEGajn / karEGajn / kontentEGas  
/ KontentULO / KontentULO / lertEGe

Ĉu vi sukcesis trovi la ĝustan lokon por ĉiuj? Gratulon! Mi certEGis ke por vi tio ne estos problemo. Kaj jen, nun vi vere povas legi nian helpo-peton. Jen niaj tro simplEGaj invit-kartoj. Ĉu vi povus beligi ilin per desegnaĵoj?



Ĉu vi havas eble ankaŭ bonEGajn ideojn por dekoracii festosalonon? Aŭ ĉu vi havas simplajn receptojn por bongustEGaj manĝaĵoj?

Se jes, sendu ilin kun viaj belaj invit-kartoj al nia redakcia adreso (*Stefan MacGill*, Pannónia u. 30. I. 6., HU-1136 Budapest, Hungario; retadreso: *stefan.macgill@gmail.com*). La plej belEGaj desegnaĵoj kaj la plej bonEGaj ideoj ricevos premiojn. Ek al laboro! SukcesEGon al vi!



*aparato* : nesimpla ilo, meĥanismo / *dekoracio* : tuto de diversaj ornamaĵoj / *lupeo* : grandiga vitro-peco – plej ofte rond-forma – kun tenilo / *menuo* : manĝo-karto ; listo de mendeblaj manĝaĵoj / *recepto* : detala priskribo de far-maniero de iu manĝaĵo, medikamento / *salono* : granda kaj bela ĉambro, taŭga por kunveno.

# BEST-ENIGMETO de Stefan MacGill

Enigu la bestoj en la enigmon!

1		2	3	4
	■	5		
6				
	■		■	
7	8		9	
10				
11				■



Bildoj: Pavel Rak, el Tendaraj Tagoj




## Horizontale →

- Jen ĉarma besto, kiu dormas. Ni vidas en la bildo \_\_\_\_\_.
- Jen hundo-domo. La hundo ne dormas ekstere, sed \_\_\_\_\_.
- Loĝ-loko por birdo, sur branĉo de arbo.
- Renkontiĝejo por amantoj de bestoj estas \_\_\_\_\_.
- Hundetoj ĉiam ĝuas \_\_\_\_\_ en la parko.
- Frakcion. Mi volis doni du \_\_\_\_\_ de mia glaci-kremo al la simio, sed ĝi prenis la tuton! VAAA!!

## Vertikale ↓

- Besto kiu ŝatas karoton. Ĝi kuras rapide kaj havas longajn orelojn.
- Jen besto kiu malrapide iras, kaj ĉiam kunportas sian domon!
- Hodiaŭ ni estas vizit\_\_\_aj la besto-ĝardenon.
- Gason, kiun oni uzas en brilantaj lum-afiŝoj.
- Satelito kiu rond-iras la teron en 28 tagoj kaj ofte videblas nokte. (R)
- Mi diras "\_\_\_an Tagon" al miaj kobajoj ĉiu-matene!





(R) = uzu nur la radikon, sen la finaĵo.



Saluton! Mi volas montri mian inventaĵon. Mi inventis tempo-maŝinon. Per ĝi ni iros al la estonteco kaj vidos kiel vivas homoj en la jaro 5006.

Saluton! Hodiaŭ nia leciono estas pri la antikvaj egiptanoj. Ili konstruis piramidojn.



# EMERIDI


Tio? Tempo-maŝino? Ĝi tre similas al mia lav-maŝino.

Jes, mi transformis vian lav-maŝinon al tempo-maŝino.

Kio? ... Kial?

Se ni vojaĝos en la estontecon, kial ne alveni pura?

komenci ①  
akvumi ②  
ŝapumi ③  
tralavi ④





Ĝi preskaŭ perfekte funkcias. Nur la direktilo bezonas iom pli da laboro.

Do, anstataŭ vere vojaĝi, mi rakontos kion mi jam vidis en 5006.



Mi dubas pri ĉi tio. Sed mi komencos rakonti pri Egiptanoj.






Mi ekrakontas...

Por konstrui la piramidojn,  
oni uzis multajn sklavojn.  
Ili alportis ŝtonojn per...

*spacŝipoj kiuj veturas  
je pli ol lum-rapido...*

...kaj suprenlevis ilin per...

*molekul-nivela tele-  
portado kaj gravito-  
nuligaj laser-pafiloj*



La egiptaj faraonoj, reĝoj kaj  
princoj loĝis en...

*spac-urboj konstruitaj  
en plastaj cilindroj dek  
kilometrojn super la planedo*

...dum la kompatindaj sklavoj  
devis loĝi en...

*kvinn-stelaj luksaj krosŝipoj  
vizitante dek galaksiojn jare*



Erni, Mi kredas  
ke vi ĝenas  
mian lecionon.  
Ĉesu!



MI? Mi nur rakontas  
pri 5006. Ne ĝeniĝu  
pro mi! Daŭrigu.



Hmm.  
Tipa egipta manĝo estis...

*sintezita mult-proteina pilolo  
kun karbohidrata vaflo  
kovrita per mono-natri-  
glutamato*

...kiun oni pretigis per...

*aldono de polvigitaj  
semoj de la bunĝiba  
planto kreskanta nur  
sur la planedo Kvang  
en la sunsistemo  
Pzuŝkvadlo.*







Parto 5 de 'La piramidoj'

## La dek-mura ĉambro

Vi solvis la lastan enigmon, do vi kaj la esploristoj eniras dek-muran ĉambron kaj vidas kolonojn. Sur la muroj estas skribaĵoj.

"Ho, ili estas la nomoj de la planedoj!" diras Sandra.

"La egiptanoj sciis multon pri astronomio." aldonas Roberto.

Laŭvice ĉirkaŭ la muroj aperas literoj sur brikoj, kiuj nomas planedojn.

"Vidu, la ĉambro estas dek-flanka, kaj sur ĉiu muro aperas la nomo de planedo." vi krias.

"Preskaŭ ĝusta, unu ne estas planedo"

"Vere. La suno ne estas planedo."

Ili lumigas kaj legas la skribaĵojn, unu post la alia.

S U N O

V E N U S O

U R A N O

T E R O

N E P T U N O

M E R K U R O

S A T U R N O

M A R S O

J U P I T E R O

P L U T O

Meze de la planko videblas dek truoj, samgrandaj kiel la muraj brikoj.

"La egiptan skribon super la brikoj, tion mi scias traduki!" krias Karlo.

**Dek-mura la salon', kun planko-truoj dek**

**Po unu ĉerpu vi – al solv' legantoj, ek!**

**Truojn nutru vi, per brikoj el la muroj**

**Nomu planedaron, por trezor-plezuroj!**

La grupo gapas, mure, planke, sed solvon ne vidas ili. Kiujn brikojn ili devas meti en la planko-truojn por legi sekretan vorton kiu konvenas al la enigma versaro?

Sendu vian respondon por havi ŝancon ricevi premion:

Hajnal MacGill, Lajos u. 47a-3-1, HU-1036 Budapest, Hungario [sapiszokni@freemail.hu](mailto:sapiszokni@freemail.hu)

# Interkultura

# m n d



Rubrikestro: Elena Nadikova,  
Lernejo/Ŝkola 40,  
ul. 324 strelkovoj divizii, 10  
RU-428031 Ĉeboksari, Rusio.  
lena\_espero@mail.ru.

**Saluton**, karaj legantoj! *Interkultura mondo* kun ĝojo bonvenigas vin sur siaj paĝoj!

Ĉu vi enpensigis iam, karaj amikoj, pri la nomo de nia rubriko? *Interkultura mondo*... Kion ĝi signifas? Ĉu mondo inter kulturoj? Ĉu mondo, unuiganta, *interliganta* kulturojn de diversaj landoj kaj popoloj de nia mondo?

Se jes, kiel tiu unuigo - *interligo* - okazas? Pri tio ni deziras rakonti hodiaŭ.

... ..

Post sia estiĝo Eŭropa Unio starigas plurajn dispoziciojn por ebligi interŝanĝojn inter eŭropanoj. Unu el tiuj programoj estas „Socrates / Comenius 1 - inter lernejoj“. Ĝi enhavas plurajn celojn:

- plibonigi la kvaliton de la edukado kaj formado de instruistoj;
- kreskigi la bazajn kompetentecojn kaj lingvan instruadon;
- disvolvi la uzadon de komputiko;
- plibonigi la instruadon de matematiko kaj sciencoj;
- disvolvi aktivan eŭropan civitancon.

Kadre de tiu programo funkcias la projekto AKEL - Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj. Ĝi estas propono de Eŭropa Esperanto Unio, apogita de la portalo Ĝangalo, por helpi la solvon de la problemo de lingva diskriminacio en Eŭropa Unio.

Ĝenerala celo de la projekto estas: firmigi la senton de eŭro-civitaneco per uzado de neŭtrala lingvo Esperanto. Kaj specifike:

- interkomuniki pri personaj, lernejoj, urbaj kaj landaj sciindaĵoj;
- interŝanĝi kulturajn kaj historiajn spertojn;
- koni aliajn eduk-sistemojn;
- provi novajn lingvo-instruajn teknikojn;
- disvastigi interkulturecon kaj spertigi al la partoprenantoj la lingvan diversecon.

Partoprenantoj de la projekto - lernejoj el diversaj landoj de Eŭropo - lernas Esperanton kiel neŭtralan lingvon, korespondas per ĝi, studas historion, geografion kaj kulturon de siaj landoj; interŝanĝas sciojn kaj spertojn kun siaj ali-landaj amikoj. Kaj la fina produktaĵo de la projekto estas esperanta kaj naci-lingva ret-paĝaro, enhavanta la laborojn pri kulturo kaj historio de la divers-landaj partoprenantoj.



Jen estas kelkaj rezultoj de la projekto AKEL.

En sun-brila Italio ( la lando de la ĉi-jara Universala Kongreso) okazis la dua renkontiĝo kadre de la projekto AKEL. (La unua renkontiĝo okazis en Polski Trambesh, Bulgario, inter la 3-a kaj 9-a de novembro 2005. Sciigon pri la renkontiĝo eblas legi en la revuo "Esperanto", numero 1/06.) De la 2-a ĝis la 9-a de aprilo 2006 ĝi kunvenigis la reprezentantojn de tri eŭropaj lernejoj - el Britio, Bulgario kaj Italio - en la itala urbo Modeno. En la mezlernejo „Cavour" okazis amika kaj solena renkontiĝo de la delegacioj de Gloucester (Britio) kaj de Polski Trambesh (Bulgario) - partneroj de la italaj lernantoj laŭ la projekto AKEL. Ambaŭ delegacioj estis oficiale akceptitaj de la lernejestro kaj de la skabeno pri Kulturo de la Urbodomo. En la lernejo okazis festa koncerto. Eŭropaj gastoj ludis kaj kantis la Eŭropan himnon de Beethoven („Al la ĝojo") en Esperanto (vidu la paĝon 15) kaj prezentis scenetojn en la internacia lingvo kaj de la signoj, riĉajn je inventemo kaj simpatia komikeco. Pli ol 60 gelernantoj de la mezlernejo „Cavour" prezentis poste al la gastoj kaj gepatroj folklorajn dancojn de malsamaj italaj regionoj. Tiuj gajaj dancoj aktivigis ĉiujn ĉeestantojn: lernejestrojn, instruistojn, gepatrojn, geknabojn. Ĉiuj perceptis la unikan amikan etoson de la renkontiĝo inter malsamaj kulturoj, kiun Esperanto ĉiam sukcesas krei.

La semajna programo de la renkontiĝo plu daŭris poste per la vizito al la ekspozicio pri historiaj kaj kulturaj heredaĵoj de Modeno, aranĝita en la lernejo. Ĝi nomiĝis „Kiam la gevoj estis etuloj" kaj estis prezentita de la

**Vizitu la hejmpaĝon Interkulturo! Vizitu la kvizojn, la forumon, ktp. Anoncu vian grupon. Komparu vian vivon kaj ŝatojn kun tiuj de aliaj grupoj en aliaj landoj kaj kulturoj. Malkovru la diferencojn inter vi, kaj trovu ankaŭ tion, kio estas inter vi komuna!** [www.interkulturo.net](http://www.interkulturo.net)

„sperta avo“ *Pino Ligabue* kaj de „Familio Pavironica“ (la tradiciaj maskoj de la urbo). Interesa estis ankaŭ la vizito al la unika ekspozicio de desegnaĵoj faritaj de la gelernantoj de la partneraj lernejoj sub la titolo „*Mia malproksima amiko*“. Aparte grand-signifa estis la partopreno de la gelernantoj de ĉiuj tri landoj en la ludo „Eŭropo“.



Ĝi estis aranĝita de la urbestroaro por plibonigi la konojn pri la eŭropaj partneraj landoj, kiuj kunlaboras en la projekto.

Fine okazis mult-media prezentado de esploroj pri historiaj kaj kulturaj realaĵoj de la tri landoj.

Dum la sekvantaj tagoj la delegacioj estis oficiale akceptitaj en la Urbodomo, kie ili aŭskultis la informojn de fakaj

asocioj kaj povis ekkoni la administran kaj ekonomian situacion en la provinco Modeno. Pri tiu vizito raportis la loka ĵurnalo „*Gazzetta di Modena*“ sub la titolo „Britoj kaj Bulgaroj. Ĝemeliĝo“. La gastoj konatiĝis ankaŭ kun la vidindaĵoj de la urbo kaj de la provinco Modeno.

Poste la partoprenantoj de la projekto foriris al Venecio. La mondkonata urbo, sendube, ravis per siaj ĉarmaj vidindaĵoj ne nur eŭropajn gastojn, sed ankaŭ tiujn italajn geknabojn, kiuj ankoraŭ ne vizitis ĝin.

Kaj la renkontiĝo finiĝis per vizito al Romo. En la „eterna“ urbo la gastojn akompanis tre lerta kaj sperta ĉiĉerono *Ranieri Clerici*. Vi certe povas imagi, kiom da impresoj ili ricevis dum sia turisma rondiro tra la urbo!

La tre intensa kaj varia programo de la semajno estis realigita

helpe de geprofesoroj *Ermanno Tarracchini* kaj *Valeria Bocchi*. Ili ricevis la subtenon de la gekolegoj, tiun de la helpa kaj administra personaro de la mezlernejo kaj de la gepatra societo „Non solo scuola - Ne nur lerneje“.



Multe helpis ankaŭ la geinstruistoj de Esperanto *Vittorio* kaj *Luisa Madella* dum la tradukado okaze de la oficialaj renkontiĝoj.

Venontan oktobron finiĝos la unu fazo de la projekto AKEL per la vizito en Gloucester.




Jen kiajn bonajn novaĵojn ricevis nia revuo danke al *Mariana Gencheva*, la gvidanto de unu el partoprenantoj de la renkontiĝo en Modeno kaj de la projekto AKEL - bulgara grupo el Polski Trambesh.

■ ■ ■

Do, oni povas certe diri, ke AKEL estas vere **Interkultura projekto!** Nia revuo sincere gratulas la organizantojn kaj partoprenantojn de la projekto kaj esperas, ke ĝi pliampleksiĝos per la partopreno de aliaj eŭropaj landoj kaj estos „konstanta gasto” sur la paĝoj de Juna Amiko!


*alternativo*: necesa elekto inter du diversaj ebloj / *amplekso*: enhava grandeco / *ĉiĉerono*: fremdul-gvidanto / *diskriminacio*: neegala traktado de homoj laŭ iuj ecoj / *dispozicio*: esprimo de ies volo, plano / *kompetenta*: kapabla ĝuste solvi problemojn, taskojn / *masko*: vizaĝokovrilo / *neŭtrala*: donanta avantaĝon al neniu / *sceno*: mallonga teatraĵo.

# SPAC-VORT-ENIGMO



## HORIZONTALE →

2. Negativaj.
5. La oka planedo – tre malvarma.
7. Kontinento sur la tria planedo.
8. Spac-veturilon, kiu rond-iras ĉirkaŭ planedo.
11. Dua litero de nia alfabeto, samtempe prefikso.
12. Trinkaĵo farita el folioj. (R)



14. Mal-virtuala. Ekzistanta.
16. La tuteco de ĉio ekzistanta – galaksioj, nebulaĵoj, steloj, planedoj, ĉio...
19. La sepan planedon.
21. Transporta Sistemo (mallongigo).
22. La vojo laŭ kiu planedo iras ĉirkaŭ la suno. (R)
24. Ĉiela vaganto.
26. Vi kaj mi.
27. La polusa glacio fandiĝos, krom \_\_\_ ni sukcesos haltigi ter-globan varmigon.
29. Faro.
30. La sezono de reviviĝo kaj varmiĝo sur la tria planedo.
33. La dua planedo – ege varma. Videbla fru-matene aŭ vespere.
35. Sufikso, kiu indikas parton (R)
36. Sufikso, kiu indikas enhavilon.
38. La naŭa planedo – tiu plej for de la suno.\*
39. La plej \_\_\_\_\_ a planedo en nia sun-sistemo havas dek du lunojn.

## VERTIKALE ↓

1. La atmosfero de la foraj planedoj estas \_\_\_\_\_ venena por homoj. Certel!
2. En biologio: senseksa . En kemio: Nek acida, nek alkala. (R)
3. Speco de tropika insulo sur la tria planedo. (R)
4. La kvina planedo – la plej granda. (R)
5. Mal-jesa.
6. Mallonga skribo. (R)
8. La sesa planedo – eble la plej bela kaj rimarkinda.
9. La gravito sur nia planedo estas la ses\_\_\_\_\_ de tiu sur ĝia luno.
10. Konstruinto de savilo kontraŭ inundo en la historio de la tria planedo.
13. Interna.
14. Korpa organo sur la tria planedo. (R)
15. Natura ĉiela korpo. Ĝenerala vorto por la kolekto de spac-objektoj.
17. Alven\_\_\_\_\_ sur la lunon, la astronauto diris: "Eta paŝo por homo, giganta antaŭsalto por la homaro."
18. Kometo havas kapon kaj \_\_\_\_\_.
20. La sesa planedo estas aparte bela pro ĝiaj \_\_\_\_\_.
23. Oni instruis, ke nia sunsistemo havas naŭ planedojn, sed nun \_\_\_\_\_ estas malcerta ĉar sciencistoj difinis pli precize, kio estas planedo.
- 24 Estas certe \_\_\_\_\_ ni ne povus vivi sen la suno.
25. La kvara planedo – la ruĝa planedo.
27. Nia suno estas \_\_\_\_\_o. (R)
28. Oriono estas planedo: falsa. Oriono estas konstelacio: \_\_\_\_\_.
29. Nia sunsistemo ne estas \_\_\_\_\_ la mezo de nia galaksio.

30. Fonto de akvo. (R)
31. Luno de la kvina planedo, vulkane aktiva, malkovrita de Galileo en 1610.
32. La tria planedo – blu-verda. (R)
33. Vic-prezidanto (mallongigo).
34. Esprimo de malcerteco.
37. La nombro de la planedoj aperantaj en ĉi tiu enigmo.

(R) = uzu nur la radikon, sen la finaĵo.

\* Ĝin oni malkovris nur en 1930. Ĝi rondiras ĉirkaŭ la suno laŭ stranga vojo, tiel ke ĝi plej ofte ja estas la plej fora planedo. Sed dum mallongaj tempoj ĝi venas pli proksimen al la suno ol la oka planedo.

**Unu planedo ne aperas en nia enigmo. Kiu?**

## ATENTON! KONKURSO!

# ABIO de l' ESPERO

### (Kristnaska Abio)

De 1521 en la regiono Alzaco de Francio estas malnova tradicio ornami arbon dum decembro por la Kristnaska periodo.

La asocioj de WINTZENHEIM-COLMAR (Alzaco) lanĉas konkurson por infanoj kaj gejunuloj pere de Esperanto.

**ORNAMU nian urban abion dum decembro 2006**

per **desegnaĵoj** pri espero, paco, Kristnasko; **poemoj** en via nacia lingvo + Esperanto; **kantoj**; **fotoj**; **man-laboraĵoj** k.t.p.

Via(j) kontribuaĵo(j) estos fiksita(j) sur la abio en la Halo de la urbo-centro dum decembro. **Sendu** via(j)n verko(j)n antaŭ la 30/11/2006 al:

TAKE-ESPERANTO "Konkurso Abio"

90, Rue du Tiefenbach

F-68920 WINTZENHEIM-COLMAR, Francio

NEPRE skribu vian nomon, adreson, aĝon kaj kelkajn vortojn en Esperanto.


La konkursaĵon vi povas sendi ankaŭ ret-poŝte al: [clbm@wanadoo.fr](mailto:clbm@wanadoo.fr)

**PREMIOJ** - La unuaj de ĉiuj kontinentoj ricevos 75 eŭrojn, la ceteraj diversajn premiojn. (Informoj en diversaj Esperantaj gazetoj.)



## Alumeta ali-meto (paĝo 21)


**Tasko 1:** Transloku du alumetojn por formi kvar egale grandajn triangulojn:



**Tasko 2:** Forprenu SES alumetojn tiel ke restu SES:



## Korpa krucaĵo (paĝo 22)



**Kaŝ-frazo:**

SANA  
MENSO  
EN SANA  
KORPO.

## KviNoKviZo / Menda pen' (paĝo 30)

**Demando 1:** La ĝusta vic-ordo estas: 7, 4, 2, 6, 8, 1, 5, 9, 3.

**Demando 2:** RESTORACIO, KUIRISTON, LEVANTA, NEDERLANDE, LERN-EJO, GREKA, SALUTON.

**La kaŝfrazo:** LA KELNERO SILENTAS EN OK LINGVOJ.

**Demando 3:** La kelnero estas... monolingva poligloto.

**Demando 4:** levas, aĉiŝo, mutas, angla. La lingvoscio de la kelnero estas LAMA

**Demando 5:** 1 = G, 2 = E, 3 = Ĝ, 4 = A, 5 = B, 6 = F, 7 = C, 8 = D, 9 = Ĉ.

## Atako de la boholeoj (paĝo 34)

La aĉaj boholeoj diras al vi: "Se vi diros malveron, ni bruligos vin! Se vi diros veron, ni jetos vin al krokodiloj!"

Nu, kion diri?

**Respondo 1:** Diru demandon, ĉar tio estas nek vera nek malvera.

**Respondo 2:** Diru "Vi bruligos min."



# Besto-parado

*Jen frazoj, kiuj priskribas aŭ difinas bestojn. Divenu la bestojn! Skribu viajn respondojn kaj notu la komenc-literojn de la bestoj en la donita ordo. Vi trovos sekretan demandon, kiun dirus lerneĵano pri ekskurso (tre aktuala demando en tiuj landoj, kie la lerneja jaro komenciĝis antaŭnelonge).*

1. Kvarpieda besto, kiun homoj kutimas rajdi.
2. Granda mamulo kiu manĝas berojn, plantojn, fiŝojn kaj foje aliajn bestojn.


3. Birdo kiu tre bele kantas.
4. Besto-grupo – la plej mult-nombra sur la tero.
5. Granda predanta birdo, simbolo de Usono.



6. Besto trovebla en Esperanto-kunsidoj!
7. La reĝo de la bestoj.
8. Rapida saltema besto de la afrika savano; geparda tagmanĝo.
9. Granda birdo, kiu ne povas flugi, sed demetas enormajn ovojn.
10. Ruf-kolora simi-speca mamulo, kun nomo malaj-devena.

11. Plej fidela amiko de homo.
12. Granda akva serpento.
13. Predo-birdo kiu manĝas mortintajn bestojn; purigisto de la savano.
14. Krabo, kiun la homoj multe manĝas.
15. La plej hom-simila besto-grupo.

16. Preskaŭ blinda besto kiu fosas tunelojn kaj loĝejojn sub la tero.
17. Besto kiu protektas sin per multaj dornoj.
18. Pra-elefanto.
19. Aminda nigra-blanka urso, kiu manĝas bambuon.
20. Naskejo por birdoj kaj reptiloj.
21. Speco de strigo.



22. Ruf-kolora ruza besto.
  23. Tre granda lacerto.
  24. Ĉevalo en stria piĵamo!
  25. Ĉasantoj de amerikaj bizonoj.
  26. Besto kun solida ŝelo, kiu paŝas tre malrapide kaj vivas longe.
  27. Sufikso, kiu signifas la bebon aŭ infanon de homo aŭ besto.
- 
28. Kuniklo-simila besto, sed pli granda, kun longaj oreloj kiuj pendas.
  29. Parenco de krokodilo, kiu mangâs fiŝojn.
- 
30. La plej granda mamulo, kiu vivas en la maro.
  31. La plej granda ter-besto. Mamulo, granda kaj griza kun rostro.
  32. Longa senpieda besto, foje venena.
  33. Granda kato kun strioj, kiu vivas en ĝangalo, savano kaj tajgo. Restis el ili malmultaj.
  34. Aŭstralia akva mamulo kun beko simila al tiu de anaso.
  35. Alta, long-kola besto.
  36. La nacia simbolo de Nov-Zelando.
  37. Granda, forta besto, nuntempe ekzistanta, kun unu granda korno nazo-meze.
  38. Mara mamulo, inteligenta kaj aminda.
  39. Granda aŭstralia birdo, kiu ne povas flugi.
  40. Loĝ-loko por la plimulto de birdoj.
  41. Vid-organo de bestoj kaj homoj.
  42. Ĉas-birdo simila al akcipitro aŭ falko.



**Skribu la komencliterojn ĉi tie:**

□ □ □ □ □ □ □ □ □ □

□ □ □ □ □ □ □ □ □ □

□ □ □ □ □ □ □ □

□ □ □ □ □ □ □ □ □ □ □ □ ?

*Ĉu vi estas instruisto, kursgvidanto de nia lingvo?*

Se vi bezonas mallongajn, interesajn tekstojn por viaj lernantoj, kursanoj, abonu kaj abonigu nian revuon.

Ĝi multe helpos vin kaj ilin.

# AMERIKAJ LEGENDOJ

Kompilis Jozefo de J. Campos Pacheco, Kubo

*La indianoj, kiuj loĝis en Ameriko antaŭ la konkero de la hispanoj, tre amis siajn birdojn. Por la indianoj iliaj belaj flugiloj valoris pli ol oro kaj arĝento. Inter la birdoj, kiujn la amerikaj indianoj pleje amis, estis kecalo kaj kondoro. Kecalo estis preferata birdo de kiĉeoj (vidu la antaŭan numeron, paĝo 14), kiuj loĝis en Gvatemalo. La alia birdo, kondoro, loĝis kun la keĉuoj, indianoj de Andoj, en Peruo kaj Bolivio.*

*Multaj belegaj legendoj parolas pri tio, kiel naskiĝis kecalo kaj kondoro. Legi ilin estas kvazaŭ paroli kun la indianoj mem.*

## KONDORO

Kondoro estas amiko de la indianoj, kiuj loĝas en Andoj, la altega montaro de Sud-Ameriko. Ĝi estas la birdo, kiu plej alte flugas. Ĝi estas ankaŭ la plej forta kaj rapida. Ekzistas multaj legendoj, kiuj rakontas ion pri ĝi. Unu el ili diras, ke iam estis granda sekeco en la vilaĝo, kie ĝi loĝis. Mortis pro soifo: homoj, bestoj kaj ankaŭ arboj. La kondoro suferegis, ĉar ĝi ne povis elteni, ke ĝiaj vilaĝanoj mortas. Ĝi decidis, do, flugi ĝis la altega monto nomata Ajaĉiri. La legendo rakontas, ke tiu montaro estas tre saĝa kaj sci-povas paroli kiel homoj.

Dum kelkaj tagoj la kondoro senhalte flugis, sed mankis ankoraŭ iom por atingi sian celon. Ĝi sentis sin senforta, sed pensis, ke la vilaĝanoj saviĝos, se ĝi atingos la montosupron. Tiu penso iomete refortigis ĝin, kaj ĝi, duon-morta, atingis la monto-pinton. Ajaĉiro vidis ĝin kaj kunsentis ĝian grandan penegon.

La monto, vidante la kondoron mortanta, diris:

*„Kara kondoro, bonvolu ne morti. Se vi atingis mian pinton, vi povas esti mia plej bona amiko. Vi povas fari, ke mi ne estu plu sola. Mi ne permesas al vi morti.”*

La kondoro preskaŭ senvoĉe rakontis al la monto kiu-cele ĝi flugis tiel alte. La kondoro diris, ke ĝi bezonas rimedon kontraŭ la sekeco, kiu mortigas ĝian vilaĝon, kaj petis helpon. *„Mi scias pri la rimedo”,* diris la monto, *„sed unue mi kuras vin kaj donos al vi manĝaĵon.”*

*„Ne. Diru la rimedon nun”,* petegis la kondoro. *„Mia vilaĝo bezonas ĝin. La vilaĝanoj povas morti, se mi ne rapide forflugos.”*

La monto ne konsentis kaj diris: *„Vi ne povas viva atingi la vilaĝon. Vi eĉ ne havas forton por flugi, ĉar vi flugis tro multe.”*

La kondoro insistis: *„Diru al mi la rimedon, kaj mi promesas, ke kiam malaperos la sekeco kaj mia vilaĝo estos savita, mi loĝos kun vi.”*

*„Bone”* diris la monto. *„Diru al viaj vilaĝanoj, ke se ili trovos la floron de*



*prujno, kiu troviĝas en la fundo de la lago, ekpluvos kaj la vilaĝo estos savita."*

La kondoro denove flugis dum kelkaj tagoj ĝis sia vilaĝo. Tie ĝi transdonis la novaĵon al la vilaĝanoj, kiuj rapidis al la lago kaj akiris la floron. La vilaĝo saviĝis, kaj la kondoro flugis denove ĝis la montosupro kaj plenumis sian promeson loĝi tie.

Ekde tiam, laŭ la legendo, kondoro estas la mesaĝisto de la montoj, kaj ĝi povas flugi pli alte kaj pli rapide ol la ceteraj birdoj, kaj oni diras, ke ĝi estas la amiko de la indianoj, kiuj loĝas en Andoj, la montaro plej alta de Sud-Ameriko.

*indiano: praloĝanto de Ameriko / legendo: rakonto pri io pratempa / prujno: glaciĝintaj akveretoj sur folioj.*

#### **PIEDNOTOJ de Himno al Eŭropo (p.15)**

*civitano: plen-raĵta membro de regno, unio / juro: tuto de regularo pri rajtoj kaj devoj / juri: firmege promesi / konkordo: plena samopinieco, harmonio / kontinento: mond-parto / ŝildo: praa militista ŝimilo de kapo kaj brusto, tenata per mano.*

#### **KOREKTO de eraroj en la antaŭa n-ro (paĝo 46) Solvoj de „Ĉu vi scias...”**

4. Kiel nomiĝas la preĝejo de judoj?  
*Sinagogo.*
5. Kion signifas la vorto 'koncentrejo'?  
*Punejo, en kiu la membroj de iu etno estas severe gardataj. La unuajn koncentrejojn organizis hispanaj koloniistoj.*

#### **SOLVO de la testo (p. 39)**

1. C / 2. B / 3. C / 4. A / 5. Ĉ / 6. C /  
7. Ĉ / 8. A / 9. Ĉ / 10. B / 11. C / 12. A

## **Frاندaj esprimoj kun KORO**

**havi koron** (*esti kuraĝa aŭ kompatema*)

**havi bonan koron** (*havi kompatemon*)

**havi puran koron**

(*esti honesta, senkulpa*)

**havi koron el oro** (*esti tre bonkora*)

**mia koro**

(*karesa nomo de amata persono*)

**tutkore / plenkore**

(*kun sincera amo, respekto*)

**koramato** (*la elektita amat(in)o*)

**kortuŝi** (*emocie forte efiki*)

**koro de Francio / Italio**

(*esti la centro de io: Parizo / Romo*)

**io premas al iu la koron**

(*iu estas malĝoja pro io*)

**krevi al iu la koron**

(*havi subitan malĝojon*)

**havi, kiom la koro deziras**

(*esti plen-kontenta*)

**ŝiri / fendi ies koron**

(*kaŭzi al iu malĝojegon*)

**kio iras el koro, venas al koro**

(*konfido naskas konfidon*)

**malkovri antaŭ / al iu sian koron**

(*sincere konfesi ion*)

**se okulo ne vidas, koro ne avidas**

(*prefere ne montri por ne vekti deziron*)

**malŝarĝi la koron**

(*eldiri, fine, ion neeldiritan*)

**se la koro tiras vin**

(*se io plaĉas al vi*)

**alpreni ion al la koro**

(*tutkore interesiĝi pri io*)

**ami / ridi / labori el / per tuta koro**

(*sindone, plenkore fari ion*)

**mia koro neniel emas al rido**

(*mi ne estas ridema*)

**doto koron ne varmigas**

(*riĉeco ne povas anstataŭi amon*)

## ILUSTRITA FRAZELOGIO

„Ilustrita frazeologio”, la libro de *Sabine Fiedler* kaj *Pavel Rak* enhavas multajn tre utilajn parol-turnojn. Mendebla ĉe eldonejo **KAVA-PECH**, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice (Prago), Ĉeĥio. (Rete: [info@kava-pech.cz](mailto:info@kava-pech.cz), TTT-ejo: [www.kava-pech.cz](http://www.kava-pech.cz)).

**Ĉi-foje ni prezentas al vi frazeologiaĵon:**

### *Balai antaŭ la propra pordo*

*Klarigo:*

Ordigi siajn proprajn aferojn antaŭ ol trakti / kritiki tiujn de aliaj



Ekzemploj:

- Se ĉiu *balaos antaŭ sia pordo*, tiam en la tuta urbo estos ordo. (PROVERBARO ESPERANTA n-ro 353)
- Se ĉiu kunlaboranto *balaus antaŭ sia pordo*, rigore kontrolante sian taskon, antaŭ ol liveri ĝin al la posta kunlaboranto en la ĉeno, verki tiajn antaŭparolojn certe ne estos necese. (MONATO 10/97: 3)
- Mi provas sekvi vin kiel ekzemplon, tamen vi preskaŭ ĉiu-foje akre kritikis miajn agojn. *Balau antaŭ via propra pordo*, mi petas.
- Ne okupiĝu pri miaj problemoj, *balau antaŭ via propra pordo*, mi petas.
- Tedis nin, ke anstataŭ *balai antaŭ sia propra pordo*, ŝi ĉiam deziris enmiksi sin en ĉies privatan vivon.
- Ĉesu! Mi jam cent-foje petis vin *balai antaŭ via propra pordo* kaj ne ŝovi ĉiam la nazon en fremdan vazon.

*frazeologio*: esprimo propra al iu lingvo / *ilustri*: per bildo igi ion pli klara, komprenebla / *kontroli*: ekzameni por trovi la erarojn / *kritiki*: prezenti la mankojn de verko / *rigora*: severa.

# KONTROLU VIAN LINGVO-SCION PER TESTO

1.	Kio ne estas periodaĵo?			
	A: gazeto	B: ĵurnalo	C: magazeno	Ĉ: revuo
2.	Li multe laboris _ direktoro. Kiu formo estas malĝusta?			
	A: kvazaŭ	B: apenaŭ	C: estante	Ĉ: kiel
3.	Kompletigu! Sen ĉiĉerono ili ekiris _.			
	A: sole	B: sola	C: solaj	Ĉ: unuj
4.	Kiu el ili estas greno?			
	A: aveno	B: avelo	C: avino	Ĉ: avizo
5.	Kiu el ili ne estas simpla radik-vorto?			
	A: plafono	B: leono	C: fripono	Ĉ: dekono
6.	Trovu la plej proksiman sinonimon de <i>ĉmerito</i> .			
	A: veterano	B: oldulo	C: pensiulo	Ĉ: kadukulo
7.	Kiam? Kiu respondo ne estas rekomendinda?			
	A: Dimanĉe.	B: Dimanĉon.	C: En dimanĉo.	Ĉ: Je dimanĉo.
8.	_ la stacio mi venis _ Stefano _ taksio. Kiu prepozicio estas superflua?			
	A: el	B: per	C: de	Ĉ: kun
9.	Per kiu litero vi ne povas krei novan vorton el <i>manki</i> ?			
	A: ĝ	B: r	C: d	Ĉ: f
10.	Mi, Anna kaj Jozefo havas pakaĵojn. Mi petis Jozefon porti _ pakaĵon al la aŭto. Kiu formo ne eblas?			
	A: mian	B: lian	C: sian	Ĉ: ŝian
11.	Kiu lando akceptis la esperantistojn de la 1a UK en 1905?			
	A: Rusio	B: Pollando	C: Francio	Ĉ: Germanio
12.	En la mondon _ nova sento. Kiu vorto mankas el la konata verso?			
	A: venis	B: flugis	C: iris	Ĉ: kuris

(Solvinte la taskojn, kontrolu ilian ĝustecon sur paĝo 37.)

# Bildoj el la historio de ESPERANTO

## II. Grandega programo de grandega pedagogo

En la nov-epoko, t.e. post la malkovro de Ameriko komencis formiĝi mondaj merkato kaj socio. Konsiderinde plioftiĝis internaciaj kontaktoj, sekve la mult-lingvecon de la mondo oni spertis pli kaj pli granda obstaklo. Multaj revis pri unu-lingva homaro: politikistoj, filozofoj, verkistoj, utopiistoj kaj simplaj homoj same.

Pluraj el ili ne nur revis, sed ankaŭ provis krei la unu-solan „homaran” lingvon, kiun oni plej ofte nomis Universala Lingvo (UL). Kial majuskle? Ĉar ĝia unikeco estas ĝia esenco. Krome, ĝi devus esti homa kreaĵo, do oni devas ĝin plani. Ja fru-tempe evidentiĝis, ke UL ne estiĝos spontanee.

Tamen, malgraŭ la forto-streĉoj de pluraj eminentaj scienculoj, neniu el iliaj lingvo-planoj lingviĝis. Eĉ Johano Amos Komenio\*, ĉeĥa socia kaj pedagogia reformisto kontraŭis la koncepton pri UL jam en la 17a jarcento. Li eliris kun tute nova koncepto pri la venko super la lingvaj obstakloj.



En sia latin-lingva verko *Via lucis* (t.e. La vojo de la klero), aperinta en la jaro 1668, li ellaboris programon pri la solvo de la plej gravaj problemoj de la homaro. Laŭ Komenio la plej granda tasko de la homaro estas trovi oportunajn rimedojn por realigi la pacon. Lia programo estis: starigo de internaciaj instancoj, kiuj fakte povas efike kontribui al tio. La unuaj tiaj instancoj estiĝis nur 300 jarojn poste, en la 20a jarcento.



La religioj en la mezepoko kaj en la 16-17-aj jarcentoj forte motivis la militojn. Tial li serĉis solvojn ankaŭ je la religiaj problemoj. Kelkaj el liaj proponoj efektive komencis realiĝi en la 20a jarcento, sub la nomo ekumenismo.

Kiel pedagogo li rekonis, ke nenia lernado de ajna etno-devena, spontanee kreiĝinta lingvo solvos la problemon de la plur-lingveco de la homaro. Ĝuste dum lia vivo mildiĝis la religiaj konfliktoj kaj malvalidiĝis la principo „kies regno, ties religio”. Sed tiu principo nur ŝanĝiĝis al „kies regno, ties lingvo”. Ekde tiam ne la regnan religion, sed la regnan lingvon oni trudas al la homoj.

La lingva programo de Komenio estis la jena: planado de „ekskluziva, por ĉiu nacio komuna lin-

gvo”, sed ĉiu gardu kaj flegu sian propran lingvon kaj en gepatra lingvo okazu ankaŭ la lerneja instruado. Tiu lingvo estu racia (t.e. nur tio estu en ĝi, kio estas nepre necesa, sed ĉio estu en ĝi, kio necesas por esprimi ĉiujn signifojn kaj nuancojn, regula sen esceptoj, harmonia, fleksebla, nuanc-riĉa, ĝia lernado estu ĝojo kaj ĝuo, agrable sonanta, same utila por ĉiu, por neniun nacio malsimpatia, facile instruebla, ĝia lernado estu multoble pli facila, ol lernado de la etnaj lingvoj, kaj fine: ĝia instruado estu tempo-ŝpara kaj ekonomia.

Komenio longe provadis plani tiun lingvon, sed li malsukcesis.



\* Jan Amos Komenský, laŭ lia latinigita, humanista nomo Johannes Amos Comenius (1592-1670).

*ekonomia*: sistema kaj ŝparema, profito-dona / *ekskluziva*: akceptanta nur unu-specan fomon / *ekumena*: celanta al unuiĝo de kristanaj eklezioj / *fleksi*: ali-formi / *harmonio*: ĝusta, plaĉa aranĝo de diversaj aferoj / *instanco*: ofico, organizaĵo, kiu posedas juĝan aŭ decidan povon / *koncepto*: firma ĝenerala idearo pri io / *konflikto*: interpuŝiĝo de kontraŭaj opinioj / *majusklo*: iu el la literaro A, B, C, D... / *merkato*: aĉetemo por iu(j) produkto(j) / *motivo*: instiga kialo / *nuanco*: delikata, apenaŭ rimarkebla diferenco / *obstaklo*: baro, malhelpaĵo / *pedagogo*: edukisto, instruisto / *principo*: fundamenta veraĵo / *programo*: resumo de solvendaj taskoj / *religio*: instruo pri tio, kiel interrilati kun supernaturaj fortoj / *revi*: imagi tion, kion oni forte deziras / *spontan(e)a*: estiĝanta kvazaŭ sen ekstera kaŭzo / *trudi*: devigi iun akcepti ion eĉ kontraŭvole / *unika*: sola, ne havanta alian similan / *universala*: koncernanta senescepte ĉiujn, valida por ĉiuj / *utopio*: nerealigebla revuo.

**KONTAKTO**

Du-monata bel-aspekta revuo de TEJO (Tut-monda Esperantista Junulara Organizo) kun intereseĝaj artikoloj, pluraj el ili en facila lingvaĵo.

Legu ĝin! TTT-paĝo: [www.tejo.org/eldonoj.jsp](http://www.tejo.org/eldonoj.jsp)

# Konversaciaj temoj

help-materialo  
por ekzamenotoj

Rubrikestro: Judit Felszeghy

## I. Sinpreparo por ekskurso

- Hodiaŭ ni mem kuiru ion, sed ne hejme!
- Bona ideo! Ni kunprenu ĉion, kion ni havas, kaj kuiru ilin subĉiele!
- Joĉjo, kion vi opinias?
- Ni povos pretigi **hungarecan gulaŝon**. Kaj dume mi instruos al vi kiel ĝin fari. Necesas tamen **bovo-viando**, kiun ni devas aĉeti.
- Kiom?
- Ni estos ses(ope), kaj ni manĝos proksimume **po cent gramoj**, do, ni aĉetu 700-750 gramojn da viando. Plej **taŭga estas apud-osta** viando de kruro.

*Demandoj: Ĉu vi kutimas subĉiele kuiradi? Kion vi devas kunporti aŭ aĉeti por tio? Kiom da viando kaj aliaj materialoj estas necesaj? Kia-specan kuirujon vi uzas? Kiujn spicojn vi bezonas?*

## II. Kuirado

- Peĉjo, jen cepo, purigu kaj **tranĉu ĝin en malgrandajn pecetojn!** Henriko, metu kelkajn sekajn branĉetojn sur la fajron, kaj poste ŝtipojn, kiam necesos pli forta fajro! Manjo, ĉu vi povas **senŝeligi** kaj kube distranĉi terpomojn? Jen, komencu, kaj dume mi kubigas la viandon.


- Mi pretas! Kien meti la cepon? Ĝi preskaŭ plorigis min!
- Mi tuj metos

en la kaldronon du - tri kulerojn da **graso**. Kiam ĝi varmiĝos, metu en ĝin la dispecigitan cepon, kaj **kirlu ĝin** per la ligno-kulero por ke ĝi ne trofritiĝu. Trofritita cepo havas **amaran guston**. Alina, ni havas ankoraŭ tomaton kaj kapsikon, ĉu? Alportu ilin, mi



petas! Jen, ankaŭ ilin mi distranĉas kaj, bon-ŝance, mi havas iom da **akra** hungara kapsiko, mi enmetas el ĝi peceton. Nun mi aldonas ankoraŭ akvon, iom da papriko kaj kumino. Henriko, vi daŭre zorgu pri la fajro! Atentu, la kuirata gulaŝo ne **bolegu**, sed nur **boletu**!

– Restis ankoraŭ **karoto**, ĉu ni ne aldonu ĝin?  
 – Ne ĉiuj kutimas, sed, ni aldonu iom, tranĉitan.  
 Kaj fine ankaŭ la terpomon!



**Demandoj:** Ĉu vi povas prezenti la recepton de via preferata manĝaĵo aŭ tiun de iu subĉiele kuirita manĝaĵo? Kiel vi preparas la krud-materialojn – ĉu vi senŝeligas, tranĉas, kubigas, **pistas** ion?

Ĉu vi scias kiel fari taŭgan fajron? Kaj kiel, fine, **estingi** ĝin?

Ekzistas neskribita regulo, ke en la naturo meti du sekajn branĉetojn kruc-forme kaj per tio signi, ke la fajro estis bone estingita – kaj kaze de eventuala incendio, indiki, ke ne via fajro "kulpis"!

### III. Interparolo dum la manĝado

- Ho, bon-gustega! Kaj kia bon-odoro!
- Jes, plej bon-gustas gulaŝo, kuirita subĉiele! Bonan apetiton!
- Ankaŭ morgaŭ ni povos ion kuiri subĉiele, ĉu ne?
- Jes! Morgaŭ ni rostu fiŝon surkrade!
- Ni ne havas kradon kaj, krome, mi ne ŝatas fiŝon! Sed ni povos rosti sur stango!
- Nek rosto-stangon ni havas!
- Sed ni povas mem fari ilin. Ni prenos rektajn branĉojn, vergojn, pintigos ilin per tranĉilo, kaj jen, ili pretos!
- Jes, bone! Kaj ni rostos kolbason kaj cepon!
- ... kaj fungon! Mi kolektos, en la ĉirkaŭaĵo kreskas multaj fungoj!
- Do, morgaŭ ni denove manĝos multon! Nun ek! Kolektu la telerojn kaj helpu lavi la vazaron! Estas jam malfrue!

**Demandoj:** Sur kio vi rostas subĉiele? Ĉu vi uzas ion alian krom rostokrado kaj rostostango, ekzemple varmigitaĵajn ŝtonojn? Kion vi rostas surkrade, kion vi metas sur rostostangon kaj kion vi preparas sur varmega ŝtono?

Skribu al ni viajn elstarajn ĉi-temajn travivaĵojn al la adreso de la redakcio (vd. paĝon 4). Ni aperigos la plej interesajn!

Piednotoj sur paĝo 44

# STELULOJ

## VIETNAMIO DE POPOLOJ

### Nguyen Du

Nguyen Du, la plej fama kaj populara poeto de Vjetnamio, naskiĝis en 1765, en familio de mandareno, kiu servis la dinastion Le. Kiam tiu monarkio renversiĝis, li rifuĝis en provinco, kaj sensukcese provis restaŭri ĝin. Poste li revene loĝis en sia hejm-vilaĝo.

La dinastio Nguyen fondiĝis en 1802, kaj li estis invitita reveni al mandarena kariero. Li ripete rifuzis, sed fine akceptis la inviton. En 1813 li estis delegita al Ĉinio kiel ambasadoro. Li forpasis en la jaro 1820.

Nguyen Du posedis riĉan literaturan kaj muzikan kulturon kaj ankaŭ konojn pri milit-arto. Li verkis multajn poemojn, kiuj atestis, ke li revis pri pacigo de la mondo kaj savo de la vjetnama popolo.

El lia verkaro la plej fama kaj populara estas epopeo „KIEU”, konsistanta el 3.254 versoj.

#### Ĉefverko


La titolo de la ĉefverko de Nguyen Du devenas de la nomo de ĝia ĉefheroino Kieu. La priskribo de la perfekta beleco de tiu junulino kaj tiu de ŝia malpli aĝa fratino Van faras grandan impreson sur la legantoj.

*Gracion kiel floroj de arbo abrikota  
kaj animecan simplon de neĝo virge pura  
ŝi havas, tiu digna junulin' natura  
radia kiel lumo dum nokto senegala,  
riedetoj kiel floroj sur ŝiaj lipoj dancas  
kaj ŝia voĉo klaras kiel sono pur-kristala,  
la splendon de la nuboj superas ŝiaj haroj*

#### **Piednotoj de Kuirado en la naturo, p. 42-43**

*amara*: maldolĉa, kiel sensukera kafo, ekzemple / *cepo*: legomo kun bul-forma subtera parto, konsistanta el tavoloj / *eventuala*: okazi-pova / *friti*: kuiru en oleo, graso / *gulaŝo*: tipa hungara manĝaĵo (la hungara vorto *guljaŝ* = bovopaŝtisto) el bovoviando kaj diversaj legomoj / *incendio*: detrua brulego / *indiki*: montri, evidentigi / *kaldrono*: kuirujo el fero havanta formon de duonglobo / *kapsiko*: legomo, el kiu oni produktas paprikon: akran ruĝan spicon / *karoto*: legomo kun ruĝeta dika radiko manĝebla / *kirli*: movi cirklo-forme per parte enŝovita ilo / *krado*: arbo de metalaj bastonetoj unuj proksime al aliaj / *kubo*: aĵo kun ses egalaj kvadratoj ĉiu-flanke / *kumino*: speco de spico bon-odora / *pisti*: dispremi, diserigi / *recepto*: detala priskribo de farmaniero / *stango*: longa rekta maldika bastono / *ŝtupo*: mallonga dika branĉego / *tomato*: ruĝa, glob-forma, suko-plena frukto de legomo.

*kaj brilon de la neĝo ŝiaj vangoj puraj.  
Sed pli perfektas tamen beleco de fratino,  
la senkompara Kieu, talente plej supera,  
elvokas lag-spegulon aŭtunan ilumino  
de rigardo ŝia kaj brovoj la ornamojn  
arbarajn en printempo, kaj floroj kaj saliko  
jaluzas eleganton, belecon de uniko,  
belecon laŭlegende potencan pereigi  
fortegajn citadelojn kaj urbojn ruinigi,  
ne malpli raras ŝiaj talentoj por pentrarto,  
kaj poezio nobla kaj same por muziko.*



Kiel “Destino kaj Talento kontraŭas unu al la alia”, kaj “La Blua Ĉielo ofte furiozas kontraŭ belulinoj”, la vivo de Kieu dronis en maro de doloregoj. Per mensoga akuzo, lia patro estis maljuste enkarcerigita laŭ la ordono de koruptita mandareno, kiu pro mon-avido, brutale disigis ŝian familion. Por havigi al ŝia familio la necesan sumon, per kiu elaĉeti la liberigon de sia patro, Kieu akceptis la edziniĝon preparitan de svatistino.

En la feŭda socio, en kiu vivis Nguyen Du, la bazo de moralo estis Konfuceanismo, laŭ kiu amo kaj respekto de gefiloj al gepatroj estis absolutaj. Pro tio, kun disŝirita koro, Kieu forlasis sian sekretan amon (1) kaj foroferis sian junecon por savi

sian patron kaj familion.

Kiam la sentimentala Kieu ploris antaŭ la tombo de mortinta bela kaj talenta kantistino: “Kiel dolora estas la sorto de virinoj, kies vivo estas sufer-plena kaj malfeliĉa. Kiel krulega estas la Kreinto ! Eluziĝas verdaj jaroj kaj velkiĝas rozaj vangoj”, ŝi timis pri si mem : “Jam de la plej antikva tempo la kruela destino ŝparis al neniu belulino malfeliĉegan sorton.” Pro la menciitaj kialoj, Kieu rezignacie eltenis malfeliĉon sen rankoro.

Por savi sian patron ŝi konsentis edziniĝi kun nekonata viro. Sed tiu viro, kiu estis bordelisto, trompis ŝin kaj profitigis ŝian belecon kaj talenton akiri klientojn. De tiam ŝi trapasis dek kvin jarojn da suferoj kaj doloregoj. En bordelon la pur-anima belulino estis ĵetita du-foje. Ŝi provis dronigi sin ambaŭ-foje, sed malsukcese. Ŝi amare spertis la vivon de bonzino kaj persekutitino. Kvar-foje ŝi estis krule batita. Kelk-foje ŝi edziniĝis aŭ kunvivis kun amantoj, sed fine vivis sola.

## Merito de Nguyen Du

La granda merito de Nguyen Du konsistas en la fakto, ke li senmaskigis kaj denunciis la subpreman kaj perversan feŭdalismon. Indigna kontraŭ la severega sorto de virinoj, kiuj estis konsiderataj kiel sklavoj kaj komercaĵoj, li protestis por la suferantinoj, kiujn li multe kompatis.

Per sia sentema koro, li profunde sentis la suferadon de popolanoj, kaj, same kiel ili, li strebis al homa feliĉo, kiu estis konstante estingita de la potenculoj, kaj kontribuis al la luktado kontraŭ maljusteco.

Danke al la vivado de Nguyen Du dum multaj jaroj meze de vilaĝanoj, kiuj plantis rizon, juton kaj morusujon, la lingvo de lia ĉefverko eniris en la plej puran tradicion de popol-kantaro per sia fleksebleco, realismo kaj bild-riĉeco. Ĝi abundas je specialaj esprimoj kaj parol-turnoj, aludoj pri legendoj, poemoj kaj malnovaj rakontoj. Multaj el ĝiaj versoj fariĝis popol-diroj.

Li famas kiel romantika kaj realista poeto. Admirinde li kantis la belecon de pejzaĝoj, mirinde li esprimis emocion, tristecon, malesperon kaj triumfan ĝojon.

Per nur kelkaj vortoj aŭ versoj, li lerte kaj koncize karakterizis hom-tipojn. Tiel bone li realigis ilin, ke la nomoj de kelkaj aĉuloj fariĝis komun-uzataj substantivoj, ekzemple “So Khanh” reprezentas donĵuanojn, “Tu Ba” signifas bordeliston, “Hoan Thu”, ĵaluzan virinon ktp...

“KIEU” estas lia plej populara kaj konata verko. Vjetnamoj de ĉiu tempo, socia tavolo kaj aĝo ŝatas ĝin. Multaj el ili, eĉ analfabetoj, konas parkere longajn fragmentojn. Avinoj kaj patrinoj kantas ilin kiel lul-kanton. Junulinoj konsultas “Kieu” por diveni sian amon kaj estontan vivon.

“KIEU” markis gravan etapon en la historio de la vjetnama lingvo.

Ĝi estis tradukita en plurajn lingvojn. En 1965, la Monda Pac-Konsilio aljuĝis al la poeto la titolon de “**Elstara kultur-homo de la Mondo**” kaj rekomendis al landaj Pac-organizoj okazigi ceremonion memore al li okaze de la 200a jubileo de lia naskiĝo.

*Hanojo la 1an de Junio 2006*

Kompilis: **Nguyen Thi Ngoc Lan**  
vjetnama esperantistino

*(1) Laŭ feŭda etiko gejunuloj ne rajtis renkontiĝi unu kun la alia, kaj al junulinoj estis malpermesite ami kaj elekti siajn estontajn edzojn. Sed, respondinte al la voko de sia koro, la belulino Kieu aŭdacis kaŝe viziti sian amaton, kiu intence loĝis apud ŝia domo, kaj ili ambaŭ ĵuris fidelan amon. Tiu ago estis konsiderita kiel skandalo kaj puninda kulpo en Konfucea socio, sed male, Nguyen Du dediĉis multajn paĝojn al ilia libera elekto kaj tenera amo.*

*ambasadoro:* reprezentanto de regno en alia regno / *dinastio:* sinsekvo de regnestroj el la sama familio / *epopeo:* versa verko rakontanta pri heroo, epoko / *kario:* profesio, sindediĉo / *mandareno:* socia alt-rangulo / *splenda:* brile belega.

## Flor-kronoj de Havajo

### Popola kutimo

Ĉiu, kiu foje vizitis la Havajan Insularon, volonte rememoras nian belan kutimon.

Kiam iu forveturas aŭ revenas al la Insularo, liaj amikoj metas ĉirkaŭ lian kolon belajn florkronojn. Se la foriranto aŭ alveninto havas multe da geamikoj, li ricevas tiom da florkronoj, ke ili preskaŭ kaŝas lian vizaĝon.

Kiam la foriranta ŝipo preterpasas Diamantan Rokon, la homoj ĵetas la donacitajn florkronojn en la maron. Se ili flosas reen ĝis la marbordo, la foririntoj certe revenos al la Insularo. Tiel oni diras kaj kredas.

Ĉu vi, mia ĉeĥa amiko, ne volus min viziti? Venu, kaj mi bon-venigos vin per la plej bela florkrono!

(El „La Mondo Rakontas“ de  
Theodor Kilian)

## Enigma

Pramisto devas transporti tigron, kapron kaj du grandajn garbojn (faskojn) da herbo al la alia bordo de la rivero. Kaj, ne havante sufiĉan lokon sur sia barko por ĉiuj, li ne scias, kion fari, ĉar sen lia ĉeesto la tigro manĝos la kapron aŭ la kapro manĝos la herbon. Bonvolu helpi al li trovi la bonan manieron por plenumi sian taskon.

Lan, Vjetnamio

(La solvon vi trovos  
en nia decembra n-ro)

Anja Karkiainen, Finnlando

## AŬTUNA KANTO

Aŭtuno, aŭtuno!  
La laca pala suno  
ne plu posedas forton  
sin treni ĝis la alt'.  
Pluv' gutas, pluv' gutas.  
Ĝin humo ne plu glutas,  
sed koto kovras korton,  
flak' tremas sur asfalt'.

Nebulo, nebulo,  
nubega ar' en rulo  
malhelas sur tereno  
sen eĉ plej eta tru'.  
La vento, la vento  
ululas kun lamento.  
Fuĝante el la spleno  
al sudo flugas gru'.

Ripozon, ripozon  
aŭtun' dormigas rozon.  
Folioj flavaj, velkaj  
susuras sur la ter'.  
Ne ploru, ne ploru!  
Pripensu kaj memoru,  
ke post monatoj kelkaj  
ekregos primaver'.

*asfalto*: supra tavolo de vojo, trotuaro /  
*gluti*: malaperigi ion tra la gorĝo / *humo*:  
supra tavolo de la tero / *koto*: malseka,  
gluiĝema tero / *lamenti*: longe plendi /  
*primavero*: printempo / *spleno*: konstanta  
enuo / *ululi*: tir-bleki kiel lupoj.



Laŭ la libro de Paul Benneman: *Miru, pensu, ridu!*

# ***Mi scias antaŭe!***

## **1a paŝo de la ludestro Enkonduko**

*"Estimataj gesinjoroj! Vi ĉiuj certe jam vidis aŭ aŭdis artistojn, kiuj kapablas diveni ies pensojn. Nu, pri tiaj simplaj aferoj mi ne okupiĝas. Mi divenas pensojn viajn antaŭ ol vi mem ilin pensis. Ĉu vi ridetas? Tuj mi pruvos al vi, se vi konsentas!"*

## **4a paŝo por la ludantoj Adiciu al ĝi nombron!**

*Kaj nun adiciu al la skribita nombro (vi diras nombron, kiu rezultas, se vi subtrahas el 99 la nombron, kiun vi skribis sur la papereto).*

## **7a paŝo de la ludestro**

Poste turnu vin al la persono, kiu gardas vian papereton kaj petu ŝin / lin laŭtleĝi la nombron. Poste vi demandu: *Kaj kio rezultis ĉe via kalkulo?* (Ĉe ili estos la sama nombro.) *Nu, vi vidas, ke mi scias, antaŭ ol vi elektis.* Tiu simpla artifiko ĉiam tre efikas.

*Rimarko. Por atingi pli grandan admiron vi neniam uzu poŝ-kalkulilon.*

## **2a paŝo de la ludestro Surpaperigu nombron**

Skribu nombron (inter 10 kaj 50) sur papereto kaj faldu kaj transdonu ĝin al iu el la spektantoj. Petu ŝin / lin gardi ĝin ĝis la fino de la ludo.

## **3a paŝo por la ludantoj Ĉiu elektu nombron!**

Poste, petu la ĉeestantojn *skribi laŭplaĉe nombron inter 50 kaj 100.* Vi forturnu vin, por eviti postajn reklamaciojn! Kiam ĉiu skribis sian nombron, turninte vin al ili diru:

## **5a paŝo por la ludantoj Forigo de la unua cifero**

*Se vi estas pretaj, forstreku la maldekstran ciferon de la sumo, kaj adiciu ĝin al la restanta nombro.* (Se necesas helpo, klarigu per iu ekzemplo: ni supozu, ke la sumo estas 185, forpreninte la unuan ciferon, t.e. 1 restas 85 kaj se vi aldonas la forprenitan 1, vi ricevos 86.)

## **6a paŝo por la ludantoj Alveno al la fina nombro**

*La rezulton subtrahu el la nombro, kiun vi komence elektis. Atendu iomete, ĝis ĉiu solvos la tasketon.*



# LINGVA DOKTORO

H

## Pri la gramatika karaktero de la vortradikoj

Pluraj esperantistoj opinias tiun temon tute superflua. Kaj ili grandparte pravas. Oni trovas pri ĝi eĉ ne unu vorton en la baza regularo, konsistanta el 16 reguloj. Plej ofte estas evidente, ke *bel-*, *grand-*, *bon-*, ktp. havas **adjektivan** karakteron, neniu dubas pri tio, ke *patr-*, *amik-*, *ĝarden-*, ktp. estas **substantivaj** radikoj. Por ĉiuj evidentas, ke *sid-*, *leg-*, *ir-*, ktp. estas **verb-**karakteraj radikoj. Tamen ekzistas okazoj, kiam necesas scii la karakteron de la vortradiko, ĉar sen tio oni ne povas ĝuste pluformi la vorton aŭ kapti ties sencon.

Ni prenu kiel ekzemplon la radikon *martel-*. Ĉu ĝi havas substantivan aŭ verban karakteron? *Martelo* kaj *marteli* ambaŭ formoj estas ofte uzataj. Sed, se ni prenas ĝin kiel verban radikon, *martelo* havas la sencon de agado per martelo kiel ĉe ĉiuj supraj vortradikoj verbaj: *sido*, *lego*, *iro* ... indikas la nomon de unufoja ago. Sed ni scias, ke *martelo* estas metala ilo, per kiu oni martelas. La substantivan formon de la agado ni povas esprimi nur per *martelado*, aŭ se temas nur pri unufoja ago, oni diras plej ofte: *martelbato*. Simile oni povas formi verbojn per simpla i-finaĵo el la vortoj: *broso*, *serpo*, *forko*, *kulero*, *krajono*, *hojo*, *pioĉo* (ili ĉiuj estas nomoj de instrumentoj), kaj ili signifas agadon per la menciitaj instrumentoj kaj la

substantivan formon de la agado oni ĉiam devas esprimi per *-ado*. Tiel kondutas ankaŭ la sekvaj veturiloj: *biciklo*, *motorciklo*, *aŭto*, *boato*, *trajno*, k.a. aŭ muzikiloj kiel *violono*, *violonĉelo*, *cimbalo*, *fluto*, *gitaro*, ktp. aŭ sportludoj kiel *futbalo*, *basbalo*, *basketbalo* k.a. Ĉe ili la simpla verbigo rezultigas respektive veturon kaj ludon per la nomitaj iloj. Ne forgesu, ke ĉe ili la ag-substantivo ĉiam esprimiĝas per sufikso *-ad*. La afero estas iom ĝena pro tio, ke tute similaj agoj kiel, ekzemple, *tranĉi*, *falĉi*, *kombi*, *tajpi*, *rasti*, *fosi*, ktp. per aldono de *-o* oni venas al ag-verboj, neniam al instrumentoj. Tiuj ĉi lastaj estas formitaj per sufikso *-il*.

Lasta-tempe ĉiam pli kaj pli ofte oni verbigas adjektivojn. Anstataŭ *La horloĝo estas malfrua* oni preskaŭ ĉiam diras: *La horloĝo malfruas*. Simile: *Ŝi belegas* (= estas belega); *Mi malgajis* (= estis malgaja); *La tasko facilas* (= estas facila). k.a. Per verbigo de adjektivaj radikoj oni ĉiam venas al kompakta esprimo: *esti -a(j)*.

Okaze de vort-farado atentu, do, iomete pri la gramatika karaktero de la vortoj. Iam oni formis agon el substantivaj radikoj per sufikso *-um*, ekz. *butono* > *butonumi*. Nuntempe oni preskaŭ neniam iras tiun vojon, sed la pli kurtan: *butoni*. Kaj tio estas logika vojo.

Geza Kurucz, Hungario

# VERDA PAĜO

## FAKTOJ KAJ ARGUMENTOJ PRI ESPERANTO

Tiu ĉi rubriko servas niajn novulojn. Oni ofte faras al ni demandojn, kiujn – pro manko de sperto – estas malfacile respondi, konvinke rebati. Ĉi tie ni deziras liveri utilajn faktojn kaj respondojn.

*Sci-volulo:* Saluton, kara Ĉefkomputila Moŝto. Pardonu, mi longe silentis.

*Ĉefkomputila Moŝto:* Estas ĝojinde, ke vi longe ne havis problemojn. Kaj nun, kio okazis? Parolu, Scivolulo.

tas popoloj, kiuj ankaŭ per la lingvo volas altrudi sian potencon, dirante, ke ĝi estas portanto de pli alta kulturo. Ĉiu lingvo estas unika kaj valorega, konservenda. Kiu forlasas

## Esperanto kaj la naciaj lingvoj

*S:* Iu mia klas-amiko, protestas kontraŭ la studado de fremdaj lingvoj. Li diras, ke ili mortigas la gepatrajn lingvojn. Ĉu vi sam-opinias?

*Ĉ:* Plej-parte ne. Pensu pri tio, kiom da novaj vortoj pruntis ĉiu popolo el aliaj, ĉefe najbaraj lingvoj. Miloj da „fremdaj“ vortoj fariĝis propraĵoj de aliaj popoloj, nacioj. Ĉi tiujn vortojn nun ili konsideras kiel siajn proprajn kaj grand-parte nur lingvistoj scias pri ilia fremda deveno.

*S:* Mi akceptas vian rezonadon, sed kion diri pri Esperanto? Tiu mia amiko diras, ke Esperanto „ŝtelis“ ĉiujn siajn vortojn el aliaj lingvoj.

*Ĉ:* Momenton. Tuj mi respondos vian ĵusan demandon, sed unue mi daŭrigos la antaŭan penson. Fakte ekzis-

sian lingvon, tiu senigas sin de siaj radikoj.

*S:* Kaj kion pri Esperanto?

*Ĉ:* El ĝia historio neniu povas menci okazon, kiam ĝi volis sin altrudi kiel plej valoran lingvon. Ĝi ĉiam deziris esti neŭtrala pont-lingvo inter diversaj nacioj kaj ĝuste pro tio ĝi pruntis siajn vort-radikojn el pluraj lingvoj.

*S:* Se ĝi favorus nur unu-du lingvojn, tio ofendus la interesojn de la ceteraj, kaj se ĝi elpensus arte-faritajn vortojn, tio egalus neglekton de la homa kulturo. Kaj, ĉar Esperanto-kulturo kolektas en si la valoraĵojn de ĉiuj kulturoj, ĝi ne povas altrudi unu kulturon kiel „superan“. Sekve, ĝi estas la ideala solvo.

*Ĉ:* Ĝuste. Vi tute pravas. Gratulon!

Aŭtoro: SONMY ÁLVAREZ, Kubo  
Tradukis: JOSE DE J. CAMPOS PACHECO  
Kun la permeso de Kuba infana revuo ZUNZUN

# KLAŬDIA



JEN, VI FARIS  
TION DENOVE.



Skoltinetoj kuiras, manĝas kaj amuzas sin  
ĉe la rando de arbaro.



*Foto de Saliko, Finnlando*